

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

RENKONTE AL
GLORIAJ
JUBILEOJ

•
ELDONADO
DE LERNILOJ

•
FORPASIS
EMINENTA
LINGVISTO

•
LAJ VETERANOJ

•
LINGVAJ
DEMANDOJ

•
LIRIKISTO-
KLASIKULO

•
ESPERANTO
EN PROFESIOJ

•
GENIA RUSA
POETO



JARO 56 • N-RO 5 • MAJO • 87

SOLDATO REVENINTA EL LA FRONTO...



Dum la Patrolanda Milito multajn vojojn trairis la ordinara soldato de l'Soveta armeo Pavel Poljakov. Sufiĉege li spektis homajn suferojn kaj mem eltrinkis plenan glason da malbonaĵoj. Plej dolore impresis lin vilaĝoj kaj urboj, kiujn oni povus rekoni nur laŭ la restintaj kamentuboj, same la ploro de l'rusa arbaro, falĉita de obusoj, bomboj kaj minoj. Kelkiuj arbaroj rigardis la ĉielon nur per nudaj trunkoj, senigitaj de branĉoj, kvazaŭ homoj sen siaj infanoj, petantaj indulgon. Tiu ĉi malgaja bildo malaperis el lia kapo nek sur la fronto, nek post la milito.

Reveninte post la militfino al sia naskurbo Suĵa, Pavel Nikolajevič estiĝis forstkulturisto. Informiĝinte pri la partia alvoko kuraci kiel eble plej rapide la vundojn kaŭzitajn de la milito, li konceptis ĝin en la rekta senco de sia profesio: redoni al la tero ties antaŭan belecon kaj eĉ ion plian — renovigi la arbarojn, aldoni al ili ankoraŭ pli allogan eksteraron. Al tio li dediĉis sian tutan postmilitan vivon.

En la ĉirkaŭaĵo de Suĵa elkreskis arbareto el strangaj pinarboj. Per greftado Pavel Nikolajevič parenigis la konatan rusan pinarbon

kun siberia cedro. Rigardante similan arbon oni nepre miras: la malsupra parto de l'trunko estas pinarba, tamen la supra — de siberia cedro. Kaj ne estas malproksima la tago, kiam tiu ĉi pinarbareto donacos al la homoj siajn unuajn cedrajn nuksojn.

La arbareto ne posedas ampleksajn dimensiojn. Ĝi nombras nur ĉirkaŭ ducent arbojn. Tamen por ĝia kreskigo estis necesa granda laboro en daŭro de dekjaroj. Sed, jen la ĉefaĵo: li fondis plantejon el greftitaj cedroj sur tereno de ĉirkaŭ tricent hektaroj.

Tre bedaŭrinde, la soveta soldato Pavel Nikolajevič Poljakov ne ĝisvivis ĝis niaj tagoj, tamen li postlasis spuron sur la tero. Ĝis nun mankas oficiala nomo de tiu arbareto, sed, laŭ komune aprobita tradicio, oni nomas ĝin Pavel-arbareto, laŭ la nomo de ties kreinto.

Pavel Nikolajevič Poljakov postlasis spuron ne nur en la Nehuma-regiono, apud sia naskurbo Suĵa. Li malavare transdonadis sian sperton al interesigantoj en la lando kaj eksterlande. Por konatiĝi kun lia sperto pri greftado de cedro sur pinon, venadis homoj el multaj distriktoj de Nehuma-regiono, el Gruzio, Armenio, soveta apudbaltaj respublikoj kaj el aliaj sovetaj respublikoj. Li ne kaŝis sian sperton ankaŭ de forstkulturistoj el la frataj socialismaj respublikoj, same el Svedio, Finnlando kaj aliaj ŝtatoj. Kaj se ie okazis malsukceso, Pavel Nikolajevič lasis flanken ĉiujn ceterajn proprajn laborojn kaj tuj skribis kaj sendis leteron tien, eĉ en eksteraj kazoj, ne ŝparante monon, li sendis telegramojn.

Jam estante ne juna homo, turmentata de frontaj malsanoj, Pavel Nikolajevič volonte reeiris al la invito de forstkulturistoj el Germana Demokratia Respubliko kaj persone grefitis tie siberian cedron sur elitajn pinarbojn, sur tereno de unu hektaro, instruante tion al siaj germanaj amikoj-forstkulturistoj. Poste li veturis al Popola Respubliko Bulgario kun la sama celo. En la vicoj de Tria Ukraina Fronto li batalis por la liberigo de Bulgario de la faŝistaj invadintoj dum la memorinda 1944.

...Kaj susuras Pavel-pinarbaretoj pareniĝintaj kun siberia cedro, susuras sur soveta teritorio kaj malproksime de ties limoj.

Pavel STIROV,
soveta ĵurnalisto-veterano,
el u. Suĵa, Ivanovo-distrikto, Sovetunio



RENKONTE AL GLORAJ JUBILEOJ

La bulgaraj esperantistoj vige kaj fervore sin preparas digne celebri du glorajn historiajn jubileojn: la centjarigo de la Lingvo Internacia Esperanto kaj la 80-jara datreveno de la fondo de Bulgara Esperantista Asocio.

Dum sia okdekjara ekzistado kaj mulfanka agado la asocio de bulgaraj esperantistoj estiĝis unu el la plej iniciatemaj kaj aktivaj Esperanto-organizaĵoj en la mondo, kun pli ol naŭ mil organizitaj membroj. BEA plenmerite gajnis internacian aŭtoritaton kaj estas konsiderata kiel unu el la bastionoj de la Internacia Lingvo. Por tio multe kontribuis la sindona aktivado de kelkaj generacioj de bulgaraj esperantistoj. Ili spertis ankaŭ malfacilajn periodojn de persekutado fare de la faŝisma regotenco, sed obstine kaj sinofere daŭrigis la disvastigadon de Esperanto en la tuta lando, ofte riskante sian vivon. Hodiaŭ ili ĝuas la ĉiufankan helpon de plej altaj ŝtataj kaj sociaj institucioj, kiuj alte taksas ilian noblan agadon en la nomo de internacia kunlaborado kaj defendo de la monda paco.

Por la celebrado de la centjara jubileo de Esperanto la Centra Estraro de BEA preparis ampleksan, enhavoriĉan programon, alte aprezitan far UEA. Multaj el la planitaj iniciatoj kaj aranĝoj jam estas sukcese realigitaj. BEA organizis Internacian Simpozion pri Turismo, kiun partoprenis UEA-estranaroj kaj reprezentantoj de esperantistaj turismaj organizaĵoj el multaj landoj. La jubilean feston de la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica partoprenis reprezentantoj de 15 landoj, multaj el kiuj partoprenis ankaŭ la internacian kvizon en urbo Razgrad omaĝe al la 100-jarigo de Esperanto. Estraranoj de BEA faris multon por propagandi Esperanton en la okazintaĵ en Sofio plenkunsidoj de la ĝeneralaj konferencoj de UNESKO kaj de la Monda Turisma Orga-

nizaĵo. Bonege estis organizitaj Tagoj de la Esperanta Kulturo en Sofio. Pri ili favore eĥis la centraj gazetoj, radio kaj televido. Delegitaro de MEM partoprenis la sesion de la Monda Pacdefenda Konsilio, okazinta en Sofio, kaj salutis la delegitojn en la nomo de MEM.

Post nelonge ni solene celebros la jubileojn de BEA kaj de Esperanto. Kun novaj sukcesoj kaj aranĝoj la bulgaraj esperantistoj esprimos sian estimon kaj fidelecon al la noblaj ideoj de la kreinto de la Lingvo Internacia d-ro L. L. Zamenhof, al la memoro de la pioniroj de la bulgara Esperanto-movado.

En la tula lando Esperanto estas instruata fakultative en mezlernejoj, en diversgradaj kursoj — en uzinoj, institutoj, altlernejoj kaj sociokulturaj organizaĵoj, el kiuj venos novaj adeptoj de la lingvo, novaj membroj de nia asocio. La Instrukomisiono ĉe BEA speciale zorgas pri preparo de spertaj instruistoj de Esperanto, kio garantias altkvalitan instruadon kaj tutcerte — bonajn rezultojn.

Junigas la estraroj de niaj distriktaj organizaĵoj kaj societoj — en jarkunvenoj estas elektataj junaj aktivuloj, al kiuj estas komisiataj respondecaj taskoj. Kune kun soci-politikaj organizaĵoj en la lando — plej ofte kun Patrolanda Fronto, sindikatoj, domoj de kulturo, Komsomolo, k. a. — la distriktaj kaj societaj estraroj realigas intersajn iniciatojn por popularigo de Esperanto en vastaj socitavoloj. Estas tamen necese organizi pli efektivan propagandon de Esperanto: arte aranĝitaj informstendoj kun fotoj kaj tekstoj mallongaj, atentokaptaj prelegoj pri Esperanto pere de centraj kaj lokaj radio- kaj televidaj stacioj; bone verkitaĵ artikoloj kaj informoj en centraj kaj lokaj gazetoj, ne lastvice — persona agitado al kolegoj, amikoj ktp.

Dum la lastaj kelke da jaroj BEA sukcesis eldoni esperantlingve multajn romanojn, novelojn, poezikolektojn, memuarojn, sciencajn verkojn de bulgaraj aŭtoroj, kio vicigis ĝin inter la plej aktivaj eldonantoj de esperanta literaturo en la mondo. Tio certe altigos la lingvokonon kaj la ĝeneralan kulturon de la bulgaraj esperantistoj kaj konigos al niaj eksterlandaj amikoj la riĉaĵojn de la nacia literaturo kaj scienco en nova socialisma Bulgario. Lige kun la jubileoj BEA okazigos ankaŭ scienc-praktikajn konferencojn kun diverstemaj prelegoj kaj raportoj.

Niaj elstaraj, jam mondkonataj kantartistoj, aktoroj kaj la kolektivo de Bulgara Esperan-

to-Teatro preparas novajn, specialajn programojn por la jubileoj. Bulgara Esperanto-Teatro sin prezentas per novaj spektakloj en Bulgario, Hungario, Hispanio kaj en Varsovio dum la Jubilea Universala Kongreso de Esperanto.

En junio ĉi-jare en Sofio la bulgaraj esperantistoj solene celebros la 80-jaran jubileon de Bulgara Esperantista Asocio. Tio estos ne nur festo de unu el la plej malnovaj en la mondo esperantistaj asocioj, ĝi estos ankaŭ festo de la humana ideo pri internacia lingvo, interkompreniĝo, paca kunekzistado kaj kunlaborado en la nomo de la vivo — por monda progreso.



PRI LA MONDLINGVA PROBLEMO

Prof. D-ro Paavo Ravila (Finnlando)

La problemo pri mondlingvo ja sendube estas hodiaŭ multe pli urĝa ol tiam, kiam Zamenhof kreis Esperanton. Kaj tamen ni ankoraŭ estas tre malproksimaj de la racia solvo.

La kaptturniga evoluo teknika de la lastaj tempoj multe proksimigis la popolojn unu al la alia, kaj malgraŭ la militoj kaj malamikecoj la bezono de internacia komunikado kreskis egalpaŝe kun la eblecoj. La gazetoj, kun grandega disvastiĝo, atingas sian ĵegantan eĉ en la plej malproksimaj regionoj, en la daŭro de kelkaj horoj, kaj la parolata, viva vorto povas trafi sian aŭskultanton kie ajn. Estu kio ajr la enhavo de nia esprimo, „homa kulturo“, ĝian plej profundan esencon verŝajne respegulas la konstanta batalo kontraŭ la katenanta efiko de la spaco kaj tempo. Ni povas diri, ke almenaŭ la voĉondoj, de radiodisaŭdigo venkis la limojn en la spaco, kaj la delikataj metodoj de konservado de homa voĉo estas trofeoj el la kampanjo kontraŭ la tempo. Tio, kion ni hodiaŭ parolas kaj diras, povas esti reproduktata preskaŭ same freŝe kaj klare post kiel ajn longa tempo. Tio, kion ĝis nun la tempo malaperigis en efemera momento, povas nun vivi jaron post jaro, teorie tiel longe kiel la homo kaj lia kulturo. En la mondo de lingvo kaj lingvoj tio estas netakseble grava. La konstantan ŝanĝiĝon kaj malkonverĝadon anstataŭas konserviĝo kaj intersimiliĝo. La studanto de la lingvo-historio scias el la spertoj de sia ĉiutaga laboro, kion tempo kaj spaco signifas en la vivo de lingvo. Kiam geografiaj kontaktoj rompiĝas aŭ malfortiĝas, la kohereco de la lingvo neeviteble disbloviĝas. Ekstas konstante novaj dialektoj, kaj la diferencoj povas tiom kreski, ke anstataŭ unu lingvo ni havos plurajn. En la fluo de la tempo siaparte la malfortiĝo de la ligoj inter la generacioj

havas saman rezulton. En kelkaj jarcentoj la lingvo povas tiel malsamiĝi, ke nur lingvo-scienцисто kapablas vidi la komunan trunkon.

La presarto kaj efika instrua sistemo jam longe influis stabiligante la lingvojn. Ni ja povis konstati, kiel la dialektoj malaperas antaŭ niaj okuloj, kaj ilin anstataŭas komuna nacia lingvo. Sed nur la lastatempa progreso de la tekniko kreis la plenajn premisojn por tiu evoluo. Sekve, ni povas diri, ke la eksteraj premisoj por la solvo de la mondlingva problemo jamekzistas: la ekzisteblo de komunlingvo, kiu restas konstanta je la fonetika sistemo kaj gramatika strukturo, estas garantiita. Ni ne plu bezonas timi, ke la lingvo baldaŭ ree disdialektiĝos.

Sed ĉu estas same kio koncernas la internajn premisojn?

Por respondi al tiu demando, ni devas klariĝi al ni kelkajn fundamentajn faktojn. Lingvo kaj kulturo estas nedisigeble interligitaj. La vera kaj nefalsa interpretanto de nacia kulturo povas esti nur la propra gepatra lingvo. Forlaso de la hejma lingvo signifas samtempe rezignon pri sia nacieco. Certe oni povus imagi, ke simile kiel la gentoj kunfandiĝis en naciojn, la nacioj iom post iom formus pli grandajn unuojn, tiel ke fine en estonteco naskiĝus vera tutmonda ŝtato baze de kohera tutmonda kulturo kaj unusola tutmonda lingvo. Ĉi tiaj piaj kosmopolitikaj utopioj tamen estas de sama klaso kiel la revoj pri miljara regno. Ni vidas hodiaŭ fortajn tendencojn krei koheran Eŭropon, sed serioza propono pri tio, ke ĉi tiu tre esperinda celo estu atingota per malaperigo de naciaj unuoj kaj sur bazo de unu sola tuteŭropa lingvo ne ekzistas. La angla lingvo ne povas, pli ol la franca aŭ la germana, respeguli la tutan eŭropan kulturon;

ĝi reprezentas nur unu flankon, certe gravan, de la eŭropa kulturo. Eĉ nordlanda solida kohereco ne estas planebla sur tiu bazo, ke la norvega, dana kaj sveda lingvoj estu kunfandotaj en unu lingvon. Se iu premisas tian aspiron kiel bazon de la kunagado, li farus veran ursan servon al la solida kunlaboro. La popoloj, kiuj atingis certan gradon de matureco insiste gardas kun plena rajto sian hejman lingvon kaj ne volas eĉ pridiskuti tian perspektivon, kiu signifus la malaperon de la nacia lingvo. Samtempe, kiam la malgrandaj naciaj lingvoj sekurigis al si pozicion, la nombro de la grandaj kulturlingvoj rapide kreskas. La vekigo de la aziaj popoloj kun centmilionoj da membroj estas fakto, kaj iliaj lingvoj postulos kaj akiros baldaŭ gravan pozicion en la internacia vivo. La leviĝon de la rusa lingvo inter la plej gravajn grandajn lingvojn de la mondo nenio povos kontraŭstari. En ĉi tiuj cirkonstancoj laŭ mia kompreno nenio krom planlingvo povas certigi vastan, universalan komunikadon inter ĉiuj popoloj. Kaj precipe el la vidpunkto de malgrandaj nacioj ĉi tio estas ekstreme grava. La sintrudo de fremda, vivanta nacia lingvo en dominantan pozicion en la vivo de malgranda lando signifas fakte la iom-post-ioman morton de ĝia nacia kulturo. Ĉar oni ne imagu, ke la fremda lingvo venos nur kiel lingvo, ĝi kunportas sian kulturon, ĉar kiel mi

diris, lingvo kaj kulturo estas nedisigeble interligitaj. Pro tio devus precipe la malgrandaj nacioj, kiuj amas sian sendependecon, forte favori la aferon de planlingvo.

La memcentra misia fervoro de ni, eŭropanoj, kiuj opiniis, ke la eŭropa kulturo kiel tia estus taŭga kaj sufiĉa por ĉiuj popoloj de la mondo, suferis lastatempe grandan malvarmigon. Ni devis konstati, ke la vekigo de la popoloj bazas sin sur ilia propra tradicio, kiu en kelkaj okazoj estas multe pli granda ol la nia. Ekzistas tamen terenoj, sur kiuj la eŭropa kulturo fakte estas agnoskita kaj aprobita kiel universale taŭga. Mi celas la sciencan kaj teknikan. Neniu popolo povas atingi internacian nivelon de plenvaloreco, se ĝi ne enkorpiĝis al si ĉi tiujn eŭropajn atingojn. Kaj ĉar la terminologio de scienco kaj tekniko estas esence grek-latina, oni povas diri, ke planlingvo, kiu konstruas sian vortaron baze de tiu heredaĵo, havas certan rajtigon al vera universaleco.

La solvo de la mondlingva problemo estas en la manoj de ŝtatestoj kaj ne de la lingvistoj. La esperantistoj montris per sia neprofitema kaj ideala laborado, ke ili povas proponi taŭgan instrumenton, konstruitan sur ĝustaj principoj. Estas bedaŭrinde, ke de flanko de tiuj, kiuj direktas la sorton de la nacioj, oni montris malmultan intereson al ĉi tiuj problemoj.

Eldonado de E-lerniloj

Lastatempe Bulgara Esperantista Asocio eldonis konsiderindan kvanton de libroj originale verkita en Esperanto aŭ tradukitaj. Gravan lokon inter ili okupas la lernolibroj, t.e. la libroj, pere de kiuj efektiviĝas la instruado de Esperanto. La ekzistantaj lerniloj estas destinitaj plejparte por civitanaj E-kursoj. Estas ankaŭ lernolibro por ĝeneralantoj, verkita antaŭ multaj jaroj, kiu bezonas aktualigon.

La Esperanto-instruado en Bulgario efektiviĝas en kelkaj formoj: kursoj por civitanoj, por instruistoj kaj lernantoj, fakultativa instruado. Pro tio BEA planas pluan eldonadon de bonaj kaj interesaj diversspecaj E-lerniloj. Laŭ propono de Fako „Instruagado kaj Kvalifikado“ ĉe CE de BEA, estas aprobita nova sistemo pri eldonado de Esperanto-lerniloj, kiu estas pli efika ol la ĝisnuna. Laŭ tiu nuna sistemo planado kaj eldonado de E-lerniloj efektiviĝas jene:

1. La aŭtoro deponas petskribon ĉe la Buroo de CE de BEA kun aldono de skemo de la enhavo (lecionoj, leksiko, gramatiko, ekzercoj) kaj de tri finverkitaj lecionoj el la komenco, la mezo kaj la fino de la lernolibro. Se temas pri alispeca lernilo, oni devas al-

doni skemon kaj kvin finverkitajn paĝojn el la komenco, mezo kaj fino de la verko.

2. La Buroo de CE de BEA disponigas la ricevitaĵan materialojn al la instrukomisiono por pritraktado.

3. La taŭgajn projektojn la instrukomisiono transdonas al la Buroo de CE de BEA por aprobo kaj inkludo en la eldonplanon de BEA.

4. La aprobitajn projektojn oni resendas al la aŭtoroj por finpreparo (limtempo — de ses monatoj ĝis unu jaro).

5. Post ricevo de la preta verko la instrukomisiono proponas recenzantojn. Sekvas eventuala plibonigo fare de la aŭtoro konforme al la notoj de la recenzantoj kaj la pretan verkon oni transdonas por presado.

Tiel ni evitos la eldonadon de lernolibroj kaj helpiloj, kiuj ne respondas al la nuntempaj postuloj pri fremdlingva instruado kaj ni ŝparos longan persistan laboron al la aŭtoroj, kies projektoj ne estas aprobindaj.


Nedka VALJAVIČARSKA,
sekretario de CE de BEA

NOVA FAKO ĈE CE DE BEA

Ekde la 1-a de januaro 1987 ĉe la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio funkcias Fako de Instruagado kaj Kvalifikado en konsisto: sekretario-metodikisto — Nedka Valjavičarska, metodikistoj — Marin Bacev, Libertaria Mladenova. Al la fako funkcias

ankaŭ sepmembra instrukomisiono, kiu rajtas decidi pri demandoj koncerne la instruadon de Esperanto.

Pri ĉiuj problemoj lige kun E-kursoj, lektoroj, instru-helpiloj k. a., bonvolu turni vin al Fako „Instruagado kaj Kvalifikado“ ĉe CE de BEA — 1000 Sofio, p. k. 66, tel. 21-51-60.



Georgi Dolapčiev naskiĝis en 1908 en la urbeto Malko Târnovo, distrikto de Burgas. Lia patro laboris en akvomuelejo kaj lia patrino zorgis pri la hejmo kaj la infanoj. Naŭ gefilojn ŝi naskis, ĉiuj ĝisvivintaj almenaŭ ĝis 60 jaroj.

8-jara etulo, Georgi jam helpadis al sia patro en lia malfacila laboro. Somere li devis ankaŭ transporti per azeno lignon el la arbaro por la vintro.

En Malko Târnovo Georgi finis progimnazion. Aŭtune de 1920 la familio, pro malbonaj vivkondiĉoj, transloĝiĝis en Varna. Tie Georgi enmatrikuliĝis en la Komerca Lernejo.

Fininte ĝin en 1925, en 1926 Georgi ekoficis en la komunumo de Varna. La saman jaron li jam estis studento en la Sofia Libera Universitato.

Nur post du jaroj la juna Georgi estis promociita ĉefo de la financa fako de la komunumo. Li ĝuis la fidon de ĉiuj progresemaj oficistoj kaj kun la scio nur de la deputitoj-komunistoj regule kolektadis monhelpojn por la Komunist-Partio.

En la balotoj por parlamentanoj li voĉdonis por la komunistaj kandidatoj-deputitoj kaj post ne longe li estis eksigita el la komunumo.

Aŭtune de 1936 G. Dolapčiev kun siaj edzino kaj filineto transloĝiĝis en Sofion. Dank' al konatoj el Varna li sukcesis trovi laboron en la Kredita Kaso kiel tajpisto. Tie li kontaktiĝis kun progresemaj oficistoj kaj aktive partoprenis iliajn iniciatojn subtene al la Komunist-Partio. Georgi Dolapčiev subtenis kontaktojn kun multaj ekskolegoj, liveradis nutraĵojn, vestojn, medikamentojn, bandaĝajn materialojn k. a. por la rezista movado.

En 1950 Georgi Dolapčiev jam laboras en la Ministerio de Transporto.

Por ni Georgi Dolapčiev antaŭ ĉio estas elstara esperantisto. Jam en 1921 en Varna li komencis lerni Esperanton kaj iĝis membro de societo „Fratego“ (nun „Albatroso“) kaj post nelonge — ties kasisto. Li kunlaboris kun la elstaraj esperantistoj Zora Mladenova — Hans, Ivan (Hans) Dimčev, Dimităr Zlatarski —

KUN JUNECA FLAMO!...

Miti, Georgi Dimov k. a. Li gvidis kursojn de Esperanto por gelernantoj kaj civitanoj, iniciatis fondon de la lernejana E-societo „Verda Lumturo“, kiu sub lia gvido estiĝis tre populara.

Somere de 1925 li por unua fojo vizitis la kongreson de BEA en Sofio kaj aktive partoprenis la kunsidojn de la Gejunulara Esperantista Ligo (GEL). La kongreso de GEL elektis lin sekretario kaj komisiis al li plu gvidi la Ligon, kiu ricevis la nomon Gelernanta Esperantista Ligo (kun sidejo en Varna).

Nur 19-jara junulo G. Dolapčiev lerte gvidis la Ligon. Estis formita redakta komitato kaj komenciĝis la eldonado de ĝia presorgano „Esperantista Junularo“ (Esperantska mladej). GEL starigis kontaktojn kun gelernantaj esperantistaj societoj en la lando kaj ĉirkaŭ 60 el ili aliĝis al la Ligo.

Printempe de 1926 okazis Tutlanda Gelernanta Esperantista Konferenco en Veliko Târnovo. Partoprenis reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj societoj. La konferenco decidis, ke en 1926 okazu Unua Kongreso de GEL en Varna, samtempe kun la 13-a kongreso de BEA.

Komenciĝis streĉa laboro. Aktivuloj de la komuna Loka Kongresa Komitato estis Zora Mladenova-Hans, Ivan (Hans) Dimčev, Dimităr Zlatarski-Miti, Georgi Dolapčiev kaj Georgi Dimov. La 13-an kongreson de BEA malfermis la jam grandaĝa barbulo Georgi Aktarĝiev, kaj la 20-jara junulo Georgi Dolapčiev solene malfermis la Unuan Kongreson de GEL.

Post la liberigo de nia lando elsub la faŝismo kaj kapitalismo, en septembro 1945 en Sofio okazis la 28-a kongreso de BEA, nomita Unua Libera Kongreso, kies sekretario estiĝis G. Dolapčiev. Aŭtune de 1945 li estis elektita prezidanto de la Sofia Esperantis-a Societo „Maksim Gorkij“. Li gvidis ĝin ĝis 1956. En 1955 CK de BEA decidis okazigi la 32-an kongreson de BEA. Kiel prezidanto de la Loka Kongresa Komitato estis elektita Georgi Dolapčiev.

La 32-a kongreso okazis en 1956 en Sofio — plensukcese, impone, brile. Ĉeestis delegitaroj el Jugoslavio, Rumanio, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Francio kaj aliaj landoj.

La kongreso elektis kiel prezidanton de BEA Georgi Dolapčiev.

Tuj post la kongreso, laŭ decido de la Centra Komitato de BEA, Dolapčiev prezentis al la kunsidanta tiutempe en Kopenhago Universala Kongreso de Esperanto leteron, per kiu BEA esprimis deziron aliĝi al UEA. Li estis elektita komitatano de UEA kaj partoprenis la laboron de la kongresa Financa Komisiono.

Kvar jarojn Dolapčiev lerte gvidis BEA.

En 1958, dank' al la streĉa laboro de LKK en Sofio kaj la valora helpo de la esperantistoj el Varna, estis organizita la 33-a kongreso de BEA. Ankaŭ tiam delegitaroj el Jugoslavio, Rumanio, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Italio, Egiptio kaj gastoj el Ĉinio kaj Vjetnamio partoprenis kaj salutis la kongreson.

La kongreso reelektis G. Dolapĉiev kiel prezidanton de BEA por la sekva dujara mandato.

Rekonante la grandajn meritojn de Georgi Dolapĉiev kiel prezidanto de BEA, en 1959 la Stata Konsilio de Popola Respubliko Bulgario distingis lin per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Li estis la unua bulgara esperantisto distingita pro Esperanto-agado. Nun pro lia multjara utila socia agado kamarado Dolapĉiev denove estas distingita per alta Stata

distingo — la ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — III grado.

18 jarojn Georgi Dolapĉiev respondecis pri la esperanta emisio de Radio Sofio kiel tradukanto kaj parolanto.

Nun Georgi Dolapĉiev estas prezidanto de la Centra Kontrola Komisiono ĉe BEA. Li helpis kaj helpas redaktorojn de pluraj fakaj bultenoj, tradukas, redaktas kaj korektas asociajn eldonaĵojn.

La bulgara esperantistaro konas lin kiel ege laborema kaj senlaca homo.

Ni tutkore bondeziras al li esti ankoraŭ multajn jarojn sana kaj same tiel vigla sur la E-kampo.

Stefka ĈENKOVA

Neforgesebla amiko de Esperanto

La bulgara kaj la internacia Esperanto-movado suferis grandan perdon en la persono de akad. Kiril Bratanov — elstara amiko de la monda esperantistaro.

Akad. Bratanov ne estis esperantisto, sed dank' al sia pozicio de fama bulgara sciencisto kaj vicprezidanto de la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj li multon faris por subteni la strebojn de la esperantistoj.

Sufiĉas rememori, ke dum la 48-a kaj 63-a UK en Sofio kaj Varna li estis en la kongresaj prezidantaroj kaj faris salutparoladon en la nomo de la prestiĝa Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj. En siaj oftaj kontaktoj kun la estraranoj de BEA li ĉiam interesiĝis pri la evoluo de nia movado en landa kaj internacia skalo. Li sincere ĝojis pri niaj sukcesoj. Sed la plej grandan servon, kiun li faris al la internacia Esperanto-movado estas lia morala kaj materiala subteno al la eldonado de Esperanta versio de la prestiĝa revuo „Scienca Mondo“. Dank' al li la Federacio decidis establi la Esperantan version vice kun la versiojn angla, rusa, franca kaj germana lingvoj. Tamen

estis necese ankaŭ garantii solidan materialan bazon de la nova scienca eldono. Ankaŭ tiurilate akad. Bratanov uzis sian postenon de prezidanto de la Unuiĝo de Bulgaraj Sciencistoj por antaŭvidi en ties buĝeto 20 000 levojn-ĉiujare. Li daŭre interesiĝis pri la disvastigo de la revuo „Scienca Mondo“. Ĉe renkontiĝo kun mi aŭ kun prof. Vasil Peevski, la ĉefredaktoro de „Scienca Mondo“, li petis informojn pri la rilato de la internacia esperantistaro al „Scienca Mondo“.

La bulgaraj esperantistoj funebras pro la forpaso de la eminenta sciencisto kaj sincera amiko de Esperanto.

Esprimo de ilia estimo al la memoro de akad. Bratanov estas la daŭrigo de lia faro — regula aperigo de la revuo „Scienca Mondo“, al kiu akademiano Kiril Bratanov dediĉis multajn fortojn.

Ni kliniĝas antaŭ la personeco kaj la faro de la neforgesebla amiko de Esperanto — akademiano Kiril Bratanov.

Nikola ALEKSIEV

GASTOJ EL AFRIKO

En Plovdiv jam estas tradicia la Vespero de Internacia Amikeco. Ĉi-jare la distrikta junulara E-grupo okazigis ĝin la 20-an de februaro. La temo „Bulgara-afrika amikeco“ allogis ĉirkaŭ 20 gejunulojn. Malgraŭ la vintra frosto, ankaŭ junaj esperantistoj el urboj Karlovo kaj Stambolijski kaj el vilaĝo Brestnik venis en Plovdiv por partopreni tiun ĉi neforgeseblan emociplenan aranĝon. Gastoj estis ses studentoj el tri afrikaj landoj, kiuj sub la gvido de Lilia Sotirova lernas nian lingvon de la amikeco.

Tiun ĉi vesperon nia Esperanto-Klubejo estis nere-konebla — en ĝi regis vere afrika etoso: sur la muroj estis grandaj mapoj de Afriko, belegaj koloraj fotoj el Afriko.

Per salutvortoj E. Pejĉinova malfermis la renkontiĝon. Unu post la alia prenis la parolon Sekou Balde el

Senegalo, Cohovi Goumissi kaj Bernard Ahamise el Benino, Momoia Silla, Sekou Magassouba kaj Boniface Djouari el Gvineo. Iliaj impresigaj rakontoj en sufiĉe bona Esperanto pri la kultura, ekonomia kaj politika vivo en la evoluantaj landoj enkondukis la ĉeestantojn en tute novan mondon. Abundis demandoj flanke de la bulgaraj gejunuloj pri diversaj aliaj temoj, al kiuj la gastoj afable respondis.

Surprizo de la vespero estis, ke S. Balde malkovris la sekreton prepari verdan teon laŭ senegala maniero. Ĉiuj kun plezuro gustumis la aroman, fortan kaj bongustan trinkaĵon.

En agrablaj interparoloj la tempo pasas rapide. Neniu sentis kiel rapide pasis tri horoj kaj venis la fino de la renkontiĝo. Nia Vespero de Internacia Amikeco proksimigis kaj amikigis la junajn reprezentantojn de du kontinentoj.

Elena PEJĈINOVA

FORPASI EMINENTA LINGVISTO



La 8-an de marto 1987 post longa malsanado forlasis niajn vicojn la elstara bulgara esperantisto Simeon Stefanov Hesapčiev. Lia socia kaj kultura agado estis tre varia kaj valora. Lia E-agado estas aparte riĉa kaj meritas detalan esploron.

Simeon Hesapčiev naskiĝis la 16-an de aprilo 1910 en nerica familio en urbo Sevlievo.

En 1924 jaro li komencis lerni en la Pedagogia Mezlernejo en sia naskiĝurbo. En la aŭtuno de la sama jaro li konatiĝis kun Esperanto, alproprigis ankaŭ stenografion kaj aktive eklaboris en la esperantista societo „Sunleviĝo“ kaj en la stenografa societo.

Tuj post la Pedagogia Lernejo li fariĝis instruisto en la elementa lernejo de v. Trojanovo, distrikto de Burgas (1929). La sekvan jaron li ekstudis slavan filologion en la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“, samtempe laborante por vivteni sin. Post la Universitato unu jaron li estis instruisto en v. Šijakovi, distrikto de Sofio.

En 1936 li estis enoficigita kiel instruisto de bulgara kaj rusa lingvoj kaj de stenografio en la geknaba gimnazio de Sevlievo. Konvinkita kaj sincera amiko de Sovetunio en 1938 Hesapčiev fariĝis unu el la fondintoj de bulgara-soveta societo en la urbo kaj membro de ĝia unua estraro.

Por multoblighi tekstojn en bulgara, rusa kaj Esperanto por instrui kaj aliaj celoj li ricevis stenilpresilon de amiko-laboristo, kiu aparato poste transiris en la manojn de partizanoj. Kun la celo mem komposti la tekstojn de siaj libroj kaj broŝuroj Hesapčiev havigis al si literojn kaj arangis en sia hejmo kompostejon.

En la kompostado volonte helpis lin progresemaj lernantoj-esperantistoj kiel Dimitar Haĝiev, Angel Todorov, Marko Markov, Cano Ignev (el Lovec) k. a. Li iniciatis la eldonadon de malgranda biblioteko „Lingvaj prelegoj“, el kiu bedaŭrinde aperis nur du numeroj.

En Sevlievo li estis konstante

observata kaj denuncata fare de reakciuloj antaŭ la polico. En 1938 pro deziro helpi al lernanto-komunista kaj aktiva esperantisto, arestita en la urba policejo, li estis punita per „riproĉo“ fare de la Ministerio de Popola Klerigo, ĉar „li kompromitis sian instruistan aŭtoritaton“. Pro disvastigo de libroj nepermesitaj de la Ministerio en 1943 li estis eksigita el la gimnazio kiel komunisto laŭ la drakona faŝista Leĝo por Defendo de la Ŝtato. Nur post multaj klopodoj li estis reoficigita kiel instruisto, sed aliloke — en la gimnazio de Lukovit. La 5-an de junio la faŝista potenco sendis lin al punlaboro — konstrui stratojn kaj bombriŝufegojn en u. Plevn. Liberigis lin la socialisma revolucio je la Naŭa de Septembro 1944. Reveninte la naskiĝurbon li tuj aliĝis al la Komunista Partio.

Dum la unuaj du jaroj de la libera vivo Hesapčiev disvolvis aktivan agadon kiel instruisto en Sevlievo, kiel gvidanto de civitanaj kursoj de rusa lingvo kaj kiel preleganto en dekoj da kunvenoj.

Ekde la aŭtuno de 1946 li transloĝiĝis en Sofion. Du jarojn li instruis en la Meza Muziklernejo kaj poste estis sendita kiel lektoro de bulgara lingvo en la Universitato de Ljubljana (Jugoslavio). Dum sia unujara restado tie li publikigis artikolojn pri la bulgara literaturo, parolis pri Bulgario en kunvenoj de la E-societo, kolektis kaj sendis al la Nacia Biblioteko en Sofio maloftajn librojn, esploris la verkaron de la kroataj verkistoj Aŝker, Gregoric, Paljaruci ka., kiuj skribis pri la suferoj kaj bataloj de la bulgara popolo sub la otomana jugo.

Post sia reveno en Sofion Hesapčiev laboris kiel honorariata tradukisto ĉe Bulgara Telegrafa Agentejo kaj en la redakcio de ĵ. „Por daŭra paco, por popola demokratio“, kaj dum 1950/52 kiel lektoro de bulgara lingvo por eksterlandaj studentoj en la Sofia Universitato. Ekde 1952 li estis enoficigita redaktoro de traduko el la rusa lingvo kaj de lernolibroj de bulgara lingvo en libroeldonejo „Popola Klerigo“, kie li emeritiĝis en 1970. Li mem tradukis pli ol 20 titolojn el la rusa kaj 2 titolojn el la serbokroata lingvoj, precipe instruhelpan, metodikan kaj popularsciencan literaturon, ankaŭ unuaktajn teatraĵojn.

La Esperanto-agado de S. Hesapčiev estas aparte fruktodona.

Jam en sia infanaĝo li manifestis vigan intereson al lernado de fremdaj lingvoj (rusa, franca, turka, serbokroata). En la pedagogia lernejo li profundigis siajn konojn

en tiuj lingvoj per obstina memstara lernado. Apenaŭ 14-jara li ellernis Esperanton kaj komencis korespondi kun eksterlandaj esperantistoj, faris siajn unuajn E-tradukojn. En 1929 li unufoje partoprenis kongreson de BEA en Vidin, kies sekretario li estis elektita.

La E-kongreso en Stara Zagora (1931) elektis lin sekretario de BEA kaj redaktoro de la asocia organo „Bulgara Esperantisto“ (1931/33). Samtempe li estis membro de la redakta komitato de gazeto „Balkana konkordo“, aperanta en Sofio. En 1932 li entreprenis tri rondvojaĝojn por propagando de Esperanto, la tria el kiuj daŭris 24 tagojn.

En 1936 Hesapčiev akompanis la litovan profesoron Antanas Poška, kiu revenante el Hindujo trapasis nian landon. Sub du temoj — „Vivo sur la tegmento de la mondo“ kaj „Sub la ombroj de la palmoj ĉe Gango“ la profesoro priskribis esperantlingve siajn impresojn kaj eltrovaĵojn en tiu interesa lando. Hesapčiev majstre tradukis. Tiu prelegvojaĝo faris grandan propagandon de Esperanto. La tiamaj esperantistoj bone memoras ĝin ankaŭ nun.

En 1938 Hesapčiev estis la ĉefa organizanto de la 25-a kongreso de BEA, kiu okazis en Sevlievo. En lia dosiero en la polico la kongreso estis difinita kiel „kongreso de komunistoj“.

Por intensigi la propagandon de Esperanto en 1939 Hesapčiev komencis eldoni bulgarlingve bibliotekon „Verda Stelo“, el kiu bedaŭrinde, pro multaj obstakloj, aperis nur tri numeroj: „Letero pri la deveno de Esperanto“, „Fenestro al la mondo“, kaj „El la historio de Esperanto“. Disvastigis la librojn la eldoninto mem laŭ abonsistemo.

Per sia eksterordinare riĉa E-agado en Sevlievo Simeon Hesapčiev daŭrigis kaj grave pliriĉigis la E-tradiciojn en tiu spiritvigla subbalkana urbo kaj decide kontribuis al ĝia transformiĝo en unu el la fortikaĵoj de la bulgara E-movado.

La sofia periodo en la vivo kaj agado de Hesapčiev same estis tre fruktodona.

En 1948 aperis Lernolibro de Esperanto por komencantoj de S. Hesapčiev. Ivan Sarafov kaj Petro Kamburov. En 1957 en la eldonejo de Patrolanda Fronto sub mia redakto aperis lernolibro de Esperanto por komencantoj kun krestomatio. Relaborita, ĝi aperis poste en 9 eldonoj en eldonkvanto de ĉ. 130 000 ekz kaj fariĝis unu el la plej popularaj lernolibroj en la lando. Hesapčiev estas ankaŭ unu el la aŭtoroj de Esperanto-bulgara vor-

NOVA JUGOSLAVIA E-GENERACIO

En Jugoslavio la junularo ĉiam estis grava kaj aktiva parto de la Esperanto-movado. Jugoslavio Esperantista Junulara Asocio (JEJA) fondiĝis en 1958, kiel junulara sekcio de Jugoslavio E-Ligo (JEL), dum la 17-a Jugoslavio Esperanto-Kongreso en Novi Sad.

Nuntempe enkadre de la organoj de JEL la junularo havas sian apartan organon — Konferencon de la E-junularo de Jugoslavio, kies tasko estas kontroli la pozicion de la junularo en la movado kaj ebligi realigon kaj evoluigon de diversaj porjunularaj aktivecoj, ĉar la junularo konsistigas plejparton de la membraro de JEL.

La Esperanto-Junularo en nia lando, nome JEL, havas nun altan pozicion en la jugoslavio soci-politika sistemo. Ĝi estas agnoskita kiel socia organizaĵo ariĝanta junularon, kaj pro tio estas akceptita kiel kolektiva membro de la Jugoslavio Unuiĝo de Socialisma Junularo (JUSJ), ĉefa kaj tegmenta junulara organizaĵo en Jugoslavio. Havante tian socian statuson, prioritataj taskoj de la E-junularo estas amasigi la membraron, fondi plurajn novajn klubojn kaj grupojn en ĉiuj medioj, kie aktivigas gejunuloj, antaŭenigi agadprogramojn kaj disvastigi Esperanton. La pozicio de JUSJ kiel kolektiva membro ebligas ankaŭ materian subtenon fare de sociaj institucioj al aktivecoj de la organizaĵo.

Enkadre de la agadprogramo de JEL, la junularo realigas tre larĝan kaj riĉan agadon. Tradiciaj tutlandaj aranĝoj jam fariĝis Unuamaja Renkontiĝo de la E-Junularo, okazanta dum la lastaj dekdu jaroj en la

respubliko Bosnio-Hercegovino, Studenta E-Renkontiĝo, okazanta ĉiun jaron en alia parto de la lando, kaj Pupteatra Internacia Festivalo, sub prizorgo de Kroatia E-Ligo okazas jam dum 18 jaroj. En 1986 JEJA organizis internacian junularan laborbrigadon kiun partoprenis gejunuloj el Bulgario, Hispanio, Pollando kaj Jugoslavio. La respublikaj kaj regionaj organizaĵoj ankaŭ organizas diversajn aranĝojn, el kiuj firmiĝis Somera E-Lernejo en Pale, Junpionira E-Somero en la montaro Ozren, Novembra Junulara Festivalo ankaŭ en Ozren, Maja Festivalo en Kumrovec, junulara kvizo en Gurgevac ktp. Tradicie la anoj de JEJA partoprenas en diversaj internaciaj aranĝoj ekster Jugoslavio: en vintraj seminarioj en FR Germanio, printempaj festivaloj en Italio, someraj kursoj en Hungario kaj Pollando, laborbrigadoj en Bulgario, renkontiĝoj en Francio kaj Hispanio kaj en kunvenoj en pluraj aliaj landoj.

Laŭ la Statuto de JEL (JEJA) bazaj organizaĵoj (klubo, societo) estas memstaraj kaj ĉefaj realigantoj de la agadprogramo kaj nur por pli gravaj aktivecoj kaj aranĝoj okazas kunordigo sur respublika aŭ tutlanda nivelo. Tiel organizo de ĉirkaŭ 500 kursoj por la junularo jare, de prelegoj, ekspozicioj, kulturaj kaj aliaj aranĝoj, kiujn realigas la kluboj, certe pli bone ilustras la tre vigan aktivecon, kiun plenumas la Esperanto-Junularo de Jugoslavio.

Branko ĜURIĆ,
prezidanto de la Konferenco de
E-junularo de Jugoslavio

LERNEJANA SOCIETO

Antaŭ nelonge en la sepa klaso de la Nacia Mezlernejo pri Kulturo — Sofio, en kiu oni regule instruas Esperanton, estis fondita lernejana societo „Infano de la planedo“. La junaj esperantistoj nomis sian societon tiel, ĉar ili deziras korespondi kun gelernantoj el la tuta mondo. Iuj jam havas korespondantojn el Svedio, Francio, Sovetunio. La klasestrino Dimitrička Stoilčeva lernas Esperanton kune kun siaj lernantoj kaj ŝi mem jam korespondas kun kolegino el Japanio. La lingvon lernas ankaŭ la lerneja dentkuracisto d-ro Radeva.

Dum la fonda solenaĵo la gelernantoj prezentis interesan esperanlingvan artprogramon.

Kiel membroj de la societa estraro estis elektitaj Gergana Doneva (prezidantino), Katja Velinova kaj Svetla Kirilova.

Reprezentante al ili pluajn sukcesojn en la lernado de Esperanto kaj prezentis donacojn: silkan Esperanto-flageton kaj gramofondiskojn.

Petrana MILANOVA-MIROVA

taro, eldonita en 1963 de eldonejo „Scienco kaj arto“.

Hesapčiev altnivele tradukis en Esperanton. Aparte menciindas liaj tradukoj „Elektitaj rakontoj“ de Elin Pelin, „Sub la jugo“ de Ivan Vazov (parto), la rakonto „La grenkampo de Sokol“ de A. Karalijčev en la antologio „Bulgara prozo“, la pupteatraĵo „Kiu ne scias sian nomon“ de P. Mančev kaj M. Grekova, multajn popolkantojn.

En 1957 Hesapčiev entreprenis 45-tagan vojaĝon tra Pollando, ĈSSR kaj Hungario, kie li faris esperantlingve dekojn da prelegoj pri Bulgario.

Ekde 1960 ĝis 1970 li estis kontrola redaktoro de la E-elsendoj de Radio Sofia.

Kaj ĉie li gvidis E-kursojn, preparis novajn aktivulojn: en Bul-

gario, Pollando, ĈSSR, Hungario, Francio. Eĉ en sia hejmo en Sofio, dum la lastaj jaroj de sia vivo li instruis Esperanton al grupetoj. En sia instrulaboro li aplikis miksan metodon kaj tre ŝatis uzi bildojn kaj kantojn.

Hesapčiev estis homo eksterordinare laborema kaj laborkapabla. Oni povas diri, ke eĉ ne unu tagon en sia vivo li ripozis. Tio kondukis lin al tre vasta ĝenerala kaj lingva kulturo. Pri ĉiu vorto li povis fari longan etimologian ekskurson, montri ĝian radikon kaj praradikon, priskribi ĝian evoluon ĝis ĝia hodiaŭa formo en la lingvo. La kompara lingvistiko, pri kiu li estis aparte erudita proponis al li ĉiumomente interesajn temojn kaj oni povis tuj ajn horojn senenue aŭskulti lin kaj

admiri lian altan lingvan kaj lingvistikan kulturon.

Hesapčiev estis modelo de precizeco, disciplino kaj ordemo en ĉio. En sia privata vivo li estis tre modesta. Pri unu afero tamen li neniam rezignis — la bona libro. En lia hejmo troviĝas biblioteko el kelkmiiloj da artikoloj de bulgaraj kaj eksterlandaj aŭtoroj, inter kiuj la unuan lokon okupas la titoloj pri interlingvistiko kaj Esperantologio.

En la historio de la bulgara E-movado Simeon Hesapčiev lasis daŭran kaj helan spuron. Por la esperantistoj li restas imitinda ekzemplo de forta amo kaj sindonemo al Esperanto kaj la E-movado. Kaj aparte grave: ekzemplo de senĉesa praktika laborado por efektivaĵo de ties noblaj celoj.

Kunčo VÁLEV

Lingvaj demandoj

PRI LA PROPRA NOMO DE LA ZAMENHOFA PLANLINGVO

La propraj nomoj estas severe fiksitaj kaj oni ne povas kaj ne devas ilin ŝanĝi arbitre. La oficiala nomo de la Zamenhofa planlingvo aperis por unua fojo en la titolo de la Unua Libro, aperinta en la dua duono de 1887 (julio-novembro) en rusa, pola, franca kaj germana lingvoj sub redakto kaj eldono de la aŭtoro D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859—1917). En tiu Unua Libro la nomo de la Zamenhofa planlingvo aperas naci-lingve en du versioj: a) Lingvo Internacia (laŭ pola kaj franca esprimmanieroj) aŭ Internacia Lingvo (laŭ rusa kaj germana esprimmanieroj). Tio indikas, ke la nomo de la Zamenhofa planlingvo povis esti aŭ Lingvo Internacia aŭ Internacia Lingvo. Ambaŭ tiuj nomoj estas absolute identaj semantike. D-ro Zamenhof elektis kaj sisteme uzadis dum sia tuta vivo nur la unuan version (Lingvo Internacia). Kun la sama certeco D-ro Zamenhof povis (rajtis) elekti la duan version (Internacia Lingvo), sed li ne elektis tiun.

En 1888 aperis du libroj, en kies titoloj kaj tekstoj la nomo de la Zamenhofa planlingvo estis Lingvo Internacia. Tamen en la sekva 1889 kune kun Lingvo Internacia D-ro Zamenhof enkondukis du novajn nomojn por sia planlingvo: la mallonga— Esperanto, kaj la

ampleksa—Lingvo Internacia „Esperanto“. La mallongan nomon (Esperanto) li uzis en la „antaŭparolo“ kaj en la titolo mem de „Malgranda Vortaro de la Lingvo Esperanto“ (por rusoj, poloj, francoj, germano, kaj angloj), kies antaŭparoloj estis presitaj en la Zamenhofa planlingvo. La tria — la ampleksa — nomo de Zamenhofa planlingvo—Lingvo Internacia Esperanto, aperis en la „Nomaro de l'Verkoj pri la Lingvo Internacia Esperanto, kiu eliris ĝis oktobro 1889“, presita en la fino de „Malgranda Vortaro de la Lingvo Esperanto“, pri kiu mi jam parolis supre (1889). Tiel, en la komencigo de nia lingvo, movado kaj literaturo aperis preskaŭ samtempe ĉiuj tri nomoj de la Zamenhofa planlingvo: la oficiala (Lingvo Internacia), la mallonga (Esperanto), kaj la ampleksa (Lingvo Internacia Esperanto). En septembro 1889 aperis n-ro 1 de gazeto „La Esperantisto“, redaktata de D-ro Zamenhof kaj eldonata de Christian Schmidt, prezidanto de Klubo Mondlingvo en Nurnbergo, Germanio. En la ĉefartikolo „Prospekto“, presita paralele en tri lingvoj (germana, franca kaj Esperanto) la abonantoj renkontis ĉiujn tri nomojn de la Zamenhofa planlingvo: Esperanto, Lingvo Internacia kaj Lingvo Internacia Esperanto¹. Jen estas la brila starto.

Evidente en la komencaj jaroj de nia lingvo ĉiuj tri nomoj estis necesaj, sed iom post iom la nomo Esperanto gajnis la simpatian kaj de la esperantista amaso kaj de la esperantistaj verkistoj kaj ĵurnalistoj. Fakte ĝi fariĝis la oficiala nomo de la Zamenhofa planlingvo. Tiu aserto ne bezonas helpon de statistikaj argumentoj. Tio okazis dank' al la mallongeco de tiu

Yoshiaki MIZUNO

Raporto el Eŭropa Esperantujo

(Daŭrigo de n-ro 2/1987)

NORVEGIO

Oslo

De la 29-a ĝis la 30-a de aŭgusto, mi transiris per ŝipo la Nordan Maron, kaj atingis Oslo — la ĉefurbon de Norvegio.

Tie mi renkontis s-ron Ludvig Anjer, eks-prezidanton de la Esperanto-Klubo en Oslo. Li estas eks-ĝisinta ŝtatoficisto kaj ĉefredaktoro de „Norvega Esperantisto“.

Mi aŭdis de li pri la situacio de esperanta movado en la lando kaj la ĉefurbo. Laŭdire, plejparto de junuloj interesiĝas pri angla lingvo, kaj eĉ se ili eklernas Esperanton, ili baldaŭ forgesas ĝin pro manko de idealismo kaj aliaj kaŭzoj. Malgraŭ ĉio en Oslo estas 200 organizitaj esperantistoj.

Post du tagoj ges-roj Anjer gvidis min al la mondkonata skisaltejo Holmenkollen. Tagmangante, ni ĝuis la belegan panoramon de la urbo kaj la fjordon.

La sekvan tagon en la universitata biblioteko mi renkontiĝis kun s-ro Tom Arbo Hoeg, kun kiu s-ro Anjer aranĝis por mi intervjuon. S-ro Hoeg specialiĝas en juro, kaj

jam publikigis multajn artikolojn en la Esperanta gazeto „Internacia Jura Revuo“, kies teknika redakto li estas. Li havas intereson pri la malnovaj leĝoj, ekzemple tiuj de vikingoj, babilonoj, judoj ktp.

La sekvan tagon vespere mi partoprenis la kunvenon de la Esperanto-Klubo en Oslo, kiu okazis en la oficejo de Norvega Esperantista Ligo. Kunvenis ĉirkaŭ 30 gesamideanoj, kaj mi montris al ili lumbildojn pri Japanio kaj ankaŭ rakontis pri mia ĝistama vojaĝo. Mi amike babiladis kun s-ro Carl Stop-Bowitz, fama esperantisto-biologo. La kunveno ĉeestis s-ino Tamiko Kawakami Nilsen, pentristino kaj vigla aktivulino en Eŭropa Esperantujo.

Mi rekontiĝis ankaŭ kun la gepatroj de s-ino Nilsen, kiuj venis el Japanio por viziti sian filinon. Post la tagmezo mi vizitis la hejmon de s-ro Anjer, kiu loĝas en la antaŭurbo de Oslo inter kampoj, arboj kaj freŝa aero.

Malfrue en la nokto mi forveturis el Oslo kun agrablaj memoroj.

Trondheim

Ĝenerale mi havis neniun programon antaŭfiksitan kaj do mi povis iri kien ajn, laŭ mia kaprico.

Nun mi ekvolis viziti la arktan cirkulon. Mi trovis en la Jarlibro de UEA, ke eĉ en la plej nordaj urboj de Eŭropo kiel Boŝ kaj Troms loĝas esperantistoj. Por atingi la arktan cirkulon, mi unue veturis al urbo Trondheim, kiu situas apud la Nordmara bordo — pli ol 8 horojn per trajno de Oslo trans la montaron. Ĉar mi antaŭe sciigis pri mia alveno, min akceptis s-ro Nils Utne, scienculo-esploristo en la Norvega Instituto de Teknologio. Li gvidis min tra la urbo per aŭto, kaj kondukis min al la luksa hotelo, en kiu jam li estis rezervinta por mi ĉambron. Inter la vidindaĵoj de la urbo, la plej rimarkinda estis la Katedralo Domkirken, kiu devenas de la mezepoko.

Oni informis min, ke en la vikinga epoko Trondheim estis prospera ĉefurbo de tiu distrikto.

La sekvan tagon s-ro Utne akompanis min per aŭto dum mia ekskurso tra la urbo. Vastaj kamparo kaj arbaro faris al mi grandan impreson.

Mi prenis la trajnon de la „Nordlinio“, kiu estas konstruita lastatempe kaj etendiĝas 700 kilometrojn de Trondheim ĝis Bod en la nord-polusa regiono laŭlonge de la Norda Maro kaj fjordoj inter sovaĝaj kampoj.

nomo kaj ne malpli dank' al ties rapida elvokiveco.

Oni ne devas ignori la nomon Esperanto, kiu nun restis la plej uzata inter la ceteraj nomoj de la Zamenhofa planlingvo kaj en parolo kaj en literaturo. Kaj krome, neniu devas forgesi, ke la plej gravaj libroj kaj gazeto enhavas en sia titolo la nomon Esperanto:

a) Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto (1903)²,

b) Fundamento de Esperanto (1905)³,

c) Plena Vortaro de Esperanto (1930, dua plivastigita eldono, 1934)⁴,

e) Plena Analiza Gramatiko de Esperanto (1935—1980)⁵,

d) Esperanta Antologio. Poemoj 1887—1957 (unua eldono), 1958; Esperanta Antologio. Poemoj 1887—1981 (dua relaborita kaj kompletigita eldono), 1984⁶)

e) Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970)⁷)

f) gazeto Esperanto, aperas ekde 1905, ekde 1908 estas oficiala organo de UEA, monata⁸).

La dua nomo de la Zamenhofa planlingvo — Lingvo Internacia, — formale estas la oficiala nomo de Esperanto. Ĝi aperis nacilingve en la titolo kaj en la „antaŭparolo“ de la Unua Libro (en 26-a de julio 1887) kaj en Esperanto por unua fojo aperis en 1888 en la titolo kaj en la tekstoj de „Dua Libro de l' Lingvo Internacia“ (en januaro) kaj de „Aldono al la Dua Libro de l' Lingvo Internacia“ (en junio)⁹. Pluen ĝi estis uzata tre ofte en gazeto „(La) Esperantisto“ (1889—1895). Ekde decembro 1895 ĝi aperas ĉiumonate kaj

en la teksto kaj en la titolo de gazeto la „Lingvo Internacia“ (ĝis junio 1914/julio-decembro 1920). En la tekstoj de tiu gazeto la nomo de la Zamenhofa planlingvo — Lingvo Internacia, — estas ofte uzata, tamen cedas la unuan lokon al la nomo Esperanto.

La nomo Lingvo Internacia staras en la titolo de Universala Vortaro de la Lingvo Internacia, nur en la unua eldono (1894)¹⁰, en la titolo kaj en la teksto de la fama traktaĵo de D-ro Zamenhof: Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia“ (1900)¹¹. D-ro Zamenhof uzadis la nomon Lingvo Internacia ĝis la fino de sia vivo, vere ne ofte, sed uzadis ĝin. „Efektivaj daŭrigantoj de la Zamenhof-tradicio pri uzado de la nomo Lingvo Internacia estis plejparte la sovetlandaj Esperanto-sciencistoj Ernesto Drezen (1892—1937) — inter la du mondmilitoj¹² — kaj Eŭgeno A. Bokarev (1904—1971) — post la Dua Mondmilito¹³. Felice tiu tradicio Zamenhofa daŭre vivas ankaŭ nun sed ĝi havas seriozajn malamikojn.

Mi opinias, ke la reduktio en uzado de la nomo Lingvo Internacia venas ne nur el tio, ke ĝi estas pli longa ol la unuvorta nomo Esperanto, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi havas du sencojn: a) Esperanto kaj b) planlingvo. La plua uzado de la nomo Lingvo Internacia estas morte minacata pro nekompetenteco de kompetentuloj kaj pro nepardoninda ignoro al la sperto de D-ro Zamenhof pri nomumado de sia planlingvo.

(Daŭrigota)

Canko MURGIN

SVEDIO

Stokholmo

De Trondheim per trajno frumaten la 12-an de septembro mi atingis Stokholmon, la ĉefurbon de Svedio. Ĉe la stacio atendis min s-ro Ingemar Nordin, pensiulo, veterana esperantisto kaj eksrektoro de lernejo. Mi restis tri noktojn en la hejmo de f-ino Margit Gustavsson, ŝtatoficistino kaj poligloto. Ŝi ankaŭ parolis Esperanton iomete.

En la urbo mi vizitis universitaton, gimnaziojn, kaj la oficejon de Sveda Esperanto-Federacio.

Mi ĉeestis la kunvenon de la Esperanto-Klubo de Vällingby ekster la ĉefurbo. Mi rakontis pri Japanio kaj prezentis lumbildojn.

Post la kunveno, s-ino Ingrid Ottoson, estrino de la klubo, invitis min al sia hejmo kun aliaj veteranoj-esperantistoj.

S-ino Gun Germans kondukis min la sekvan tagon al la Gimnazio Tensta, en la antaŭurbo. Tie mi parolis angle al la studentoj pri mia vojaĝo kaj pri la utilo de Esperanto.

Atendis min granda surprizo. Mi vidis propraokule veran denaskan esperantiston! Mi estis gasto en la hejmo de ges-roj Franko kaj Ulla Luin, kiuj bonege regas Esperanton, kaj ilia filo Janko, 5-jara, parolas Internacian Lingvon tute nature kaj flue en sia ĉiutaga vivo. Li ankaŭ parolas svede. Kiam mi demandis lin, en kiu lingvo li pensas, li respondis: „Mi ne scias bone, sed iutempe „penso“ okazas

en Esperanto, kaj alitempe en sveda“.

Laŭ plej freŝaj informoj en Svedio estas ĉirkaŭ 2000 organizitaj esperantistoj. Kompare al la nombro de la loĝantaro, 8 milionoj, la cifero estas sufiĉe granda.

Uppsala

La 15-an de septembro s-ro Christer O. Kiselman, 46-jara profesoro de matematiko en la Universitato Uppsala, venis al Stokholmo per sia aŭto por akcepti min kaj ni kune veturis suden al la urbo Norrköping, kie okazis preleg-kunveno pri Esperanto, en la urbobiblioteko.

Mi ankaŭ faris koncizan prelegon pere de la interpreto de s-ro Kiselman pri temo „Lingva situacio en Eŭropo kaj la eblecoj de Esperanto“. Ĉeestis ĉirkaŭ 40 aŭskultantoj, inter kiuj estis ĵurnalistoj de la loka ĵurnalo. (Poste oni sendis al mi en Japanio la artikolon kun foto, kiu aperis en la ĵurnalo).

Dank' al zorgeme preparita programo mi povis renkontiĝi kun s-ro Chou Seung-bok, profesoro pri Japano, ĉina kaj korea lingvoj en la Universitato de Stokholmo. s-ro Sven Gustavson, profesoro de slavaj lingvoj, s-ro Esling Wande, profesoro de fin-ugraj lingvoj en la Universitato Uppsala, s-ro Erik Falt, direktoro de la instruist-eduka instituto de la Universitato, k. a.



Kune kun fratinoj Miettinen

Mi ankaŭ estis invitita al la seminario de la matematika fakto ĉe la Universitato, kaj faris koncizan prelegon pri la situacio de fremdlingva edukado en Japanio.

Mi havis impreson, ke en Svedio la Esperanto-movado prosperas precipe inter intelektuloj kaj ke la lingva problemoj en la lando estas tre komplikaj. Mia amiko s-ro Kiselman akompanis min ĝis la lasta momento, kiam ni adiaŭis ĉe la stacidomo. Kiselman estas vere fervora esperantisto kaj sindone prizorgis min. Mi ankoraŭ nun rememoras pri li kun amikeco kaj dankemo.

KOREKTA UZO DE „KVAZAŬ“

En interparoloj kun esperantistoj ofte mi rimarkas, ke ĉe uzo de **kvazaŭ** oni faras erarojn. Preskaŭ ĉiam post ĝi estas preferata indikativo, erare en pli da okazoj. Malmultaj uzas post **kvazaŭ** kondicionalon ĉe faktiva komparo, se ĝi esprimas neblaĵon aŭ ion evidente ne-realan: **La patro frapis sur la pordon, kvazaŭ li estus fremdulo.**

Zamenhof ne uzis unuece kondicionalon post **kvazaŭ** ĉe cirkonstanca subpropozicio de komparo. Laŭ lia lingvouzo la modo post **kvazaŭ** ŝajnas nedecidita demando. Kvankam la gramatika logiko postulas uzon de kondicionalo, Zamenhof uzis en analogaj frazoj jen indikativon, jen kondicionalon: **De li eliras tiaodoro, kvazaŭ li ĵus eliris el brandfarejo. Ili faras mienojn, kvazaŭ ili laboras.** Nedefinita uzo estas trovebla eĉ en la sama frazo: **Lin la popolo nomas reĝo, kvazaŭ la mondo nun denove komenciĝus kaj kvazaŭ malaperis nun subite la historio kaj la tradicioj.**

Fakte kio povas esti **kvazaŭ** en la frazo kaj kiel oni uzu ĝin korekte:

1. **KONJUNKCIO.** Ĉe cirkonstanca subpropozicio de komparo, kiu estas enkondukata per **kvazaŭ** oni identigas la komparatan elementon kun alia elemento. Tia identiga komparo estas neblaĵo, kiu povas okazi nur en formo de faktiva supozo. Ĉi-okaze post **kvazaŭ** ĉiam estas uzenda kondicionalo: **Li kuris renkonte al ŝi, kvazaŭ li volus ŝin kapti.**

FINNLANDO

Helsinki

Matene la 20-an de septembro mi atingis la ĉefurbon de Finnlando, Helsinki, per ŝipo el Stokholmo. Ĉe la elirejo de doganejo atendis min s-ino Vuokko Heinäsuo, 70-jara pensiulino, kiu parolas Esperanton tre rapide, kvankam ŝi eklernis ĝin sufiĉe malfrue. Tie ankaŭ estis s-ro Jumppanen Hannes, mezaĝa ŝtato-ficisto de la Ministerio de Edukado.

S-ro Jouko Lindstedt, juna profesoro de slavaj lingvoj kaj tre kompetenta parolanto de Esperanto gvidis min en la Universitato de Helsinki, kaj ankaŭ s-ro Tapio Sormunen akompanis min tra la urbo.

Antaŭ ĉio, estis al mi ege interese, ke la Finna Ministerio de Edukado jam preparis la proponon sufiĉe ampleksan, pri la enkonduko de Esperanto en lernejon, inkluzive en la universitaton.

Lappeenranta

Forlasinte Helsinki, mi alvenis al la malgranda urbo Lappeenranta. Tiu urbeto situas en la sud-orienta parto de Finnlando, nur ĉirkaŭ 25 kilometrojn for de la landlimo de Sovetunio. Tie mi restis kvar tagojn en la hejmo de f-ino Irja Miettinen, fotografistino, kiu havas sian propran foto-oficejon en la urbo. Ŝi loĝas kun ŝia fratino Sylvia. Ambaŭ estas tre gastemaj kaj parolas bonan Esperanton.

2. **ADVERBO.** Ĝi rilatas al iu vorto en la frazo. La predikato restas en indikativo. La formo **kvazaŭe** estas malbelsona kaj superflua. Oni povas rekonii la adverbon **kvazaŭ** per tio, ke ĝi estas en ĉefpropozicio, aŭ, se ĝi estas en subpropozicio, tie troviĝas alia konjunkcio. Ekz.: **Ŝiaj okuloj kvazaŭ paroladis.** Li kun-tiriĝis kvazaŭ erinaco. Ili vidas en mi personon, kiu kvazaŭ ludas la rolon de reĝo.

Pro tiu ĉi duflanka uzebleco de **kvazaŭ** rezultas, ke la objektan predikativon oni povas meti post ĝi:

— en akuzativon. Ĉi-okaze ĝi estas konjunkcio kaj formigas strukturo de elipsa propozicio: **Oni rigardis lin kvazaŭ (oni rigardus) ĉefon.**

— en nominativon. Tiaokaze ĝi estas adverbo, kiu ne enkondukas elipsan propozicion, sed simple modifas la sencen de la rekta predikativo: **Oni rigardis lin kvazaŭ (preskaŭ) ĉefo.** Tamen ĉar tio povas esti miskomprenon, ĝi estas evitanda: Plej bone uzeblas la adjektiva formo: **Oni rigardis lin kvazaŭa ĉefo.**

Se la subjekto estas sama, oni povas uzi ankaŭ partipician konstruon: **La hundoj ekbojis, kvazaŭ ekvidinte urson.** Tiaokaze estas elipsa propozicio kaj la ellasita verbo en kondicionalo post **kvazaŭ** estas subkomprenata: **La hundoj ekbojis, kvazaŭ ili ekbojus ekvidinte urson.**

La urbo situas apud la bela lago Saimaa kaj mi veturis ĉirkaŭ ĝin per la aŭto, kiun ŝoforis s-ro Jorma Toropainen, instruisto de lingve handikapitaj infanoj. Mi vizitis la hejmon de s-ro Uton Mustonen kune kun kelkaj gesamideanoj, kie mi unuafoje spertis finnan banon — saŭnon. Estis tre komforte resti en la varmego vaporo (80 gradojn), frapante sin per brancetoj de betulo.

La sekvan tagon mi partoprenis en la kunveno de tieaj esperantistoj. En gaja atmosfero mi babildis kaj mi rakontis pri mia vojaĝo kaj pri Japanio.

Tie ĉeestis ankaŭ s-ro Touko Nieminen, instruisto de historio en la urbo Imatra 30 kilometrojn for de Lappeenranta. Li gastigis dum unu monato japanan instruistinon, kiu estas hazarde ankaŭ mia amikino esperantista. Onidire, la mondo estas larĝa kaj ankaŭ mallarĝa. Prosperas interfluo de verdstelanoj.

Post la kunveno, mi havis intervjuon kun ĵurnalisto kaj parolis pri la celo de mia vojaĝo kaj pri Esperanto ĝenerale.

La sekvan matenon Jorma akompanis min al la stacio kaj mi forlasis la karan urbeton kun bonkoreca popolo.

Tampere

Mi atingis la duan grandan urbon Tampere, meztage la 25-an de septembro. Ĉe la stacidomo atendis min s-ino Annikki Rannisto kaj s-ino Kertti Leppälä.

Posttagmeze, en la Universitato

de Tampere, mi faris prelegon pri temo „Lingva situacio en Eŭropo kaj Esperanto“ en angla lingvo. Ĉeestis pli ol 20 studentoj kaj oni ŝajne komprenis min bone. Poste mi havis intervjuon por la loka ĵurnalo. (Aperis la arikolo kun foto sekvan matenon en la ĵurnalo. La titolo estas: „Kial silenti en mult-taj lingvoj, se ekzistas Esperanto?“

Vespere mi vizitis la Esperantan kurson por progresintoj, en kiu partoprenis 25 kursanoj. Mi rakontis pri japanajoj, montrante lumbildojn.

Turku

La 26-an de septembro mi alvenis al Turku, malnova ĉefurbo de Finnlando, apud la marbordo. Tie mi vidis s-inon Irja Klemola kaj f-inon Liisi Oterma.

Irja jam havas 87 jarojn, sed aspektas tre junece kaj parolas bone Esperanton. Liisi estas emerita profesoro de astronomio, vaste konata en la faka mondo. Unue Irja kondukis min al la Normala Lernejo (Universitato por Edukado), kie mi ĉeestis en la klasoj de lingvoj kaj s-ro Pentti Tapanen gvidis min en la Lernejo. Mi havis grandan impreson pri la bonordo kaj bonarango de la konstruaĵo kaj lernantoj.

La sekvan tagon loka ĵurnalo intervjuis min. Poste mi ĉirkaŭrigardis la urbon kun Oterma. Vespere mi adiaŭis al Turku kaj Finnlandon kun karaj memoroj.

(Fino)

Leteroj de korespondamikoj

MIA JAPANA AMIKINO

Mi eklernis Esperanton en 1982 kaj post 6 monatoj mi jam havis diplomon pri unua kaj dua grado. Aŭtune de la sama jaro mi komencis gvidi kurson por komencantoj en la urbo. Dum 4 lernojaroj diplomojn por I grado ricevis pli ol 20 gekursanoj, kaj multaj aliaj — iliaj konatoj kaj geamikoj, eksciis pri la ekzistado de la lingvo. Por partopreni la organizatajn aranĝojn ni invitas ne nur esperantistojn, sed ankaŭ amikojn de Esperanto.

Mi abonas revuon „Bulgara Esperantisto“. Gi estas mia baza fonto de legaĵoj en la lingvo Esperanto. Mi deziris havi korespondanton, por pliriĉigi miajn lingvajn konojn, sed mi preferis ke li/ŝi estu el malproksima lando, pri kiu ni malmulte scias kaj malofte aperas detaloj pri ĝi en nia gazetaro. Mi sendis mian adreson al „Internacia Fako de Japano E-Instituto“. Post pli ol unu jaro, printempe de 1984, mi ricevis leteron de s-ino Takako Kagaŭa el u. Niiza, situanta 120 km norde de Tokio. Ŝi estas instruistino de matematiko, konas la anglan lingvon, estas edziniĝinta kaj havas du infanojn, kiuj ankaŭ posedas la anglan lingvon.

Jam en sia unua letero ŝi skribis al mi, ke lernas Esperanton de post 5 monatoj kaj deziras korespondi kun bulgaroj. Ŝi skribis al mi, ke pri Bulgario en ŝia lando oni scias tre malmulte. „Bulgario situas en la orienta parto de Eŭropo, bela agrikultura lando. Multe da konfitaĵo el fragoj oni importas el via lando. La bulgarinoj havas tre belajn tradiciajn vestaĵojn kaj la poŝmarkoj de via lando estas tre belaj. Tio ĉefe estas konata en Japanio pri via lando.“

Mi sendis al ŝi malgrandan mapon de Bulgario. Krom pri la geografia situo, pri mia naskigloko kaj familio, mi komencis rakonti al ŝi pri nia historio. Ŝi ekinte-

resigis pri ĝi. Ŝi skribis al mi, ke japanoj lernas la mondan historion en mezlernejoj kaj altlernejoj. Sed tio koncernas nur la landojn el Okcidenta Eŭropo kaj Ĉinio. Malfermite sian lernolibron de historio, de kiu ŝi lernis en la altlernejo antaŭ jaroj, ŝi mire konstatis, ke pri Bulgario estas skribitaj nur 4 linioj (mi citas laŭvorte):

917 (post Kristo)	— la reĝo de Bulgario Simeon venkis la armeon de Orienta Romanio
1000—1014	Bulgario estis en batalo kun la armeo de Orienta Romanio
1018	Bulgario estis venkita de ĝi
1908	Bulgario fariĝis sendependa reĝlando

La historio de nia lando, kiun mi komencis „instrui“ al la japanino, estas tradukata de ŝi japanlingve kaj enskribata en specialan kajeron. Ŝi legas ĉiun mian rakonton al ŝiaj gesamideanoj el klubo „Stelidoj“.

Siaflanke ankaŭ ŝi komencis rakonti al mi la japanan historion. Aliaj temoj, pri kiuj ni korespondas kaj interŝanĝas sperton estas infaneducado, kuirarto, ŝatokupoj. Mi priskribas al ŝi detale ĉiun nian E-aranĝon, ŝi faras la samon, ĉar la japana E-societo same kiel la nia, vivas riĉan organizan vivon. De ŝi mi eksciis detalojn pri la Monda Ekspozicio en Cukuba — Japanio, pri iuj interesaj japanaj kutimoj, pri la kleriga sistemo k.a.

La utilo de tiu korespondado por mi estas, ke mi eksciis multon pri tiu malproksima lando, kiu diferencas de la nia laŭ klimato, loĝantaro, politika sistemo ktp., sed el ŝiaj leteroj mi komprenis, ke japanoj same kiel ni deziras vivi, labori kaj kreskigi siajn infanojn en paco.

Mi estas fiera, ke dank' al miaj leteroj kelkaj dekoj da japanoj eksciis pri la ekzisto de nia malgranda lando, pri ĝiaj historio kaj heroo popolo.

Pavlina MAKAVEEVA,
urbo Levski, distrikto de Plevna

El nia leterkesto

SALUTON EL IRAKO!

Georgi Miĥajlov estas konstrulaboristo kaj aktiva membro de la Instruista Sekcio ĉe BEA dum la lastaj jaroj. Li mem instruis Esperanton, kiun li bonege posedas. Nuntempe G. Miĥajlov laboras en Irako, de kie li sendis al la redakcio amikan leteron. Interalie li skribas:

„Karaj amikoj,

La 18-an de novembro 1986 mi forveturis Irakon. Mi planas labori ĉi tie dum du jaroj.

Mia kampadejo situas en la suda parto de Irako — 140 km for de Bagdado, inter la urboj Hila kaj Divanija. Ĝi konsistas el multaj unuetaĝaj lignaj dometoj. Ili ĉiuj estas kanalizitaj kaj provizitaj per varmregula instalaĵo.

La temperaturo en decembro kaj januaro variis inter 0°—+5°C nokte kaj 10°—15°C tage. En novembro kaj decembro pasintjare pluvigis kelkfoje, tamen en januaro kaj februaro eĉ guto da pluvo ne falis.

La naturo ĉirkaŭanta nian kampadejon estas duon-dezerta. Ĉi tie kreskas diversaj herboj, arbustoj kaj arboj, precipe palmoj. Irako okupas unuan lokon laŭ la nombro de palmoj kaj eksportado de daktiloj. Nun, dum la „vintra“ sezono, multaj ŝafaroj sin paŝtas. Apud ili en plena konkordo sin paŝtas ankaŭ bovinoj, bubaloj kaj... multaj kameloj. Estas videblaj paseroj, cikonoj kaj aliaj birdoj, en la apudvojoj lagetoj naĝas

multaj sovaĝaj anseroj. La palmoj kaj la kameloj donas ekzotikan aspekton al la naturo.

La grundo estas argileca. Privatuloj kultivas latrejon kaj kulturis medikagano maizon (*medikago sativa*) tritikon, legomojn.


Nun tage kaj nokte blovetas, la temperaturo estas tolerebla, sed tiel daŭros ĝis la ifno de marto, kaj poste...?

En 1969/70 mi havis la eblecon viziti kvin „varmajn“ landojn: Cipro, Libano, Sirio, Irako, Kuvajto. Memkompreneble, tiam mi estis pli juna. Krome, tiam mi loĝis en urboj kaj ni laboris nur vespere. Tiam mi havis la eblecon vagi tra sablajn dezertojn kaj observi la vivmanieron de ties loĝantaro, kaj nun mi spertis la vivon de la loĝantaro en la suda parto de Irako.

Ĉirkaŭ nia kampadejo abundas dise konstruitaj dometoj. Iuj el ili estas faritaj el brikoj, sed la plejmulto — el adobo. Multaj kanaloj havigas akvon kaj por la bestoj kaj por la loĝantoj. La fama rivero Eŭfrato certigas la vivon en ĉi tiu terangulo kaj kune kun Tigriso memorigas pri la historio de Mezopotamio kaj pri la pendantaj ĝardenoj de Babilono. Mezopotamio restis en la historio, kaj la pendantaj ĝardenoj de Babilono — en la fabeloj. Sed la du grandaj riveroj fluas ankaŭ nun. Kaj la murmurado de iliaj akvoj memorigas al ni, ke en la mondo nur la naturo estas eterna.

Korajn salutojn al ĉiuj legantoj de „B. E.“

Mia adreso estas:
IRAQ — BAGHDAD
P. O. Box 15092 JARMOUK
R-S TRANSKOMPLEKT
GEORGI MARINOV MIĤAJLOV



La 28-an de marto j. k. finiĝis cent jaroj de post la naskiĝo de unu el la plej grandaj bulgaraj lirikistoj — Dimčo Debeljanov. Li naskiĝis kaj kreskis en metiista familio en urbeto Kopriovŝtica, poste loĝis en Plovdiv kaj Sofio.

La unuaj poeziaĵoj de Debeljanov aperis en la gazetaro en 1906. Jam en ili eksonis la tono, kiu fariĝis baza en lia tuta verkaro: la tristo. Tristo, rezultanta el la kolizio inter la nobla idealo de la poeto kaj la ĉirkaŭa medio. Kreskinta en la kvieto kaj beleco de sia montara urbo, aparte en la ĉefurbo, ne povis akcepti la lupajn leĝojn de la kapitalisma socio kun ĝia hipokrita, falsa moralo. Lia spirito flugas al-

Poeto de la hela kredo

ten, li revas pri angulo, kie regas harmonio kaj beleco, sed ĉirkaŭe li vidas nur filiŝtran moralon, avidon al materialaj riĉaĵoj, ĉiupaŝajn manifestiĝojn de egoismo, senkoreco kaj krudeco. Tamen deturninte vizaĝon de la vulgara burĝa socio, li ne povas montri realan vojon al nova, feliĉa socio.

En 1910 lin ĉirkaŭblovas la socialismaj ideoj kaj li verkas du el siaj plej optimismaj versaĵoj — „Krucvojo de lia estonto“ kaj „Hela kredo“. En ili oni klare sentas la spiron de la proksimiĝanta revolucio, la venkon de la nova mondo de justo kaj libereco. Bedaŭrinde tiu hela kredo nedaŭre lumas en la brusto de la poeto, ĉar li staras for de la laborista klaso kaj la revolucia partio. Lia ribelo estas spontana kaj neklara, ribelo de izolita honesta idealisto. La disreviĝo pri la burĝa sociordo fortranĉas liajn flugiĵojn. Aldoniĝas tiutempe ankaŭ la laŭmoda influo de la simbolismo. La poeto sentas sin senhejma kaj sola, katenita de nigra sorto, ĵetita en seneliran prizonon. Lia animo estas krucumita de kontraŭdiroj kaj li konfese deklaras: „Mi tage senĉese konstruas, sed ĉion detruas dum nokt“. Malofte en la literaturo oni povas renkonti pli kontrastoplenan versaĵojn ol tiuj ĉi „Nigra kanto“ de Debeljanov. Ĝenerale en lia verkaro la vortoj „nigra“ kaj „hela“ plej ofte ripetigas.

Vane la poeto serĉas azilon ĉe la karaj rememoroj el la infaneco, vanaĵ estas liaj esperoj trovi konsolon

en la naturo, en la amo. Sed dum tiuj ĉi serĉadoj lia plumo naskas perlojn, pri kiuj povus fieri ĉiunacia literaturo. Tio estas poemo kun virtuozaj muzikeco kaj perfekta ritmo.

En 1916 Debeljanov iris al la fronto. Ĉi tie, meze de la soldatamaso devenanta precipe el la laborpopolo, lia liro agordigas tute realisme. El liaj versaĵoj malaperas la krepusko de la simbolismo, li revenas al la tero, al la vivo ĝuste kiam ĉiunomente ĉirkaŭ li la vivo mortas. Lia humanismo igas lin malĝoji eĉ pro ĵalinta soldato de la malamika armeo.

La 2-an de oktobro 1916 kuglo ŝiras la vivfadenon de la tenera poeto en batalo apud Demir Hisar (Makedonio). Kia perdo por la bulgara literaturo! Kaj nun ni povas nur imagi: se la poeto estus restinta viva, lia honesta civitana konscienco nereteneble kondukus lin al la vicoj de la organizitaj batalantoj por nova vivo, al la batalantoj por paco kaj feliĉo de la tuta homaro. Ĝuste tiel, kiel tio okazis kun multaj el la tiama generacio — Ĥristo Jasenov, Geo Milev, Ljudmil Stojanov k. a., kiuj post la Unua Mondmilito ĉirkaŭbrakis la revolucion.

La eksterordinare pura, etika, nobla kaj tragika personeco de Dimčo Debeljanov kaj lia granda poezia jaro ricevis delonge tutpopolan amon en nia lando kaj okupis por ĉiam indan lokon en nia nacia literatura trezorejo.

K. VÁLEV

Dimčo DEBELJANOV

HELA KREDO

Jam venas de l' malnova mond' la fin',
disŝiras sin ĉenero post ĉenero —
kaj super la ruinoj levas sin
altaro de l'justeco sur la tero.

Jam malaperas la mallum'-filmer' —
triumfas de la suno la radioj.
Flirtigas siajn flagojn kun fier'
sennombraj batalantoj kaj legioj.

En la okuloj brilas la aŭror',
ne ĝenas ilin la batalinfero, —
ĉar per la unueco kaj konkord'
forpelas ili l'ombrojn de sufero.

La travadejon ili trovis jam
kaj vidas bordon en purpura oro...
Ho, kred', pri l' nova viv', per via flam'
ardigas kaj inspiras sin la koro!

NIGRA KANTO

Mi naskiĝas en lum' kaj pereas —
multvizaga, senorda anim',
dum la tago senlace mi kreas,
dum la nokt' mi detruas sen tim'.

Se mi vokas pri tago sennuba,
jen ektondras ŝtorm' super la mar';
se mi ŝtormon alvokas inkuban,
tuj mutiĝas plendanta gitar'.

Mi sopiras aŭroron plensune,
sed blindigas min ties brifort';
en printempo mi velkas aŭtune,
en aŭtuno — printempas la kor'.

Dum la tempokurad' en senlimo
jam forvelkas junec' kiel flor';
vane serĉas ripozon l' animo —
tra dezerto disŝvebas la plor'.

Betula bosko dolĉe dormas,
la noktzeŝir' karesas ĝin;
el nigraj branĉoj malbelformaj
folioj oraj ŝutas sin.

Kaj rigardante kun admiro
la brilajn stelojn de l'ĉiel',
mi stelon mian kun sopiro
deziras vidi en malhel'.

Kaj revoj en la kor' alternas
pri mond' de radianta hel',
en kiu regas kaj eternas
feliĉo kaj senmorta bel'.

Mond', kie vivo estas kara
kaj suno brilas en l'anim'...
Ho ve! Nun en malhel' arbara
folioj ŝutas sin sur min'...

1907

Tradukis: Simeon M. SIMEONOV

REVENI EN LA PATRAN DOMON...

Reveni en la patran domon, kiam
humile estingiĝas la vespero
kaj paca nokt' malfermas sinon sian
por doni la trankvilon kaj esperon.
Kaj forjetinte la laciĝon grandan
testamentitan iam de la Sorto —
vi, gasto atendata, enirante,
timidan ĝojon vekos en la korto.

Renkontos vin sur sojloj patrinoj maljuna
kaj vi, kun via frunto sur ŝultro ŝia,
beata estos ĉe l'rideto suna
kaj longe ripetados: panjo, panjo mia!...
Kaj, enirinte, kun humila sento,
la ĉambron — via rifuĝejo lasta —
konfesajn vortojn flustros tuj en la silento
ĉe la ikono, antaŭ la Madono Ĉasta:
— Mi venis ĉe la fino de l'ekzisto —
sun' mia estas al subiro tuja...
Ho plor' kaŝita de migranto trista,
rememorinta vane panjon kaj patrujon!

1912

El la bulgara: Vasil SLAVOV
kaj Simeon M. SIMEONOV

Cu vi memoras pri l'paco de l' kort',
la ĉerizarbojn kun floroj odoraj?
Ah, ne ekbrilu en mia angor',
tristo iama kaj vanaj memoroj —
mi ekziliĝis en mia angor',
tristo iama kaj vanaj memoroj,
mia gardist' estas mia malglor',
mia verdikto — la tagoj jam foraj!

Cu vi memoras pri l'paco de l' kort',
flustro kaj rido ĉe l' arboj en floroj?
Ah, ne reveku la kanton de l' ĥor',
ĥor' de anĝeloj en tagoj jam foraj —
oni min ŝlosis en nigra prizono,
tristo iama kaj vanaj memoroj.
Songo, nur songo ĝi estis, la kort'
songo — la arboj ĉerizaj en floroj!

1914

Tradukis: Asen GRIGOROV

Ne plu malamiko nia —
la fuĝintojn el la morto
al la kontraŭflanka bordo
forbalais ŝtorm' rabia.

Jen, en tiu sulko grunda
kuŝas lia korp' glacia
kun rigard' rezignacia
al la firmament' profunda.

Sur la griza suda tero
varmigata de la vento,
sangmakulaj, en timsento,
flirtas pecoj de letero.

Kiu estas li? De kie?
Kies vokon li obeis
kaj en venka tag' pereis,
ne venkinte mem ĉi tie?


Malfeliĉa man' patrino,
ĉu en lia nigra sorto
vi konsolis lin per vorto
el la font' de am' senfina?

Trist' ridinta kaj absurda
en kruela temp' terura!
Estas lia mort' natura
sekvo de la celo murda!

Cu, veninte por mortigo,
li indulgus nin milite?
Ne, li mortis merite,
ĉesis esti malamiko!

1916

Tradukis: Simeon M. SIMEONOV



En P. R. Bulgario la 20-an de januaro j.k. estas emisiita
speciala poŝtmarko dediĉita al la 100-jara datreveno de la
naskiĝo de unu el la ple grandaj bulgaraj poetoj — Dimĉo
Debeljanov, pereinta en 1916 en la flamoj de la Unua
Mondmilito.

Subjekto de la poŝtmarko estas la portreto de Dimĉo
Debeljanov, laboro de la pentristo Damjan Nikolov.

Valoro — 5 st., formato — 28,5×39 mm; tekniko —
profunda kupra preso; papero — gumita, 100% celulo-
zo. Eldonkvanto 1000 000

SUKCESA ARANGO

La 20-an de marto j. k. vespere en aŭditorion „Vela Peeva“ en la Sofia Universitato enfluis amaso da studentoj, tiom multaj, ke ne estis loko por ĉiuj. Estis neceso ŝanĝi la ejon. Kolektigis pli ol 150 gestudentoj. Kio vekis tiel grandan intereson? Nur 2—3 afiŝoj kun la anonco: prelego kun koloraj diapozitivaj pri temo „Ĉinio — antikva kaj hodiaŭa“ de Maja Gorova.

La kunveno, organizita de la Studenta E-Societo „Vela Peeva“, estis malfermita de ĝia prezidanto Dimitro Dimitrov, studento de franca filologio. En daŭro de unu horo Maja Gorova rakontis pri sia kaj de ŝia edzo estado en tiu lando lige kun la Universala Kongreso de Esperanto en Pekino. Dum ŝia edzo Bogomil Jivkov manipulis per la diapozitiva aparato, M. Gorova tre interese kaj precize prezentis la vidindaĵojn de la ĉina ĉefurbo kun ĝia Bulvaroj de la Longa Trankvilo (ĉ. 50 km, la plej longa en la mondo), kun la fama placo Tjananman (la plej granda en la mondo), kun la palacoj kaj parkoj de la ĉinaj imperiestroj, kun stratoj plenplenaj de homoj, unuoloke biciklistoj, ĉar en tiu lando la biciklo estas la plej amasa transportilo. Poste la prelegantino kondukis nin al la Granda Ĉina Muro, unu el la sep mirakloj de la mondo.

Dum ŝia unumonata restado en Ĉinio niaj samkursanoj Gorova kaj Jivkov vizitis ankaŭ la urbojn Tajĵuan, Datung, Handĵou, Suĉĵou, Sinan kaj Sanĥajo, renkontigis kun dekoj da ĉinaj homoj — agantoj de kulturo kaj arto, intelektuloj, oficistoj, laboristoj, vilaĝanoj. Ĉie oni rilatis kun granda intereso al la reprezentantoj de socialisma Bulgario, ĉie la vorto Bulgario (la ĉinoj prononcas Bǎldjaria) vekis amikecon kaj simpatian.

La prezidanto de la societo dankis al ambaŭ geedzoj kaj prezentis florojn al Maja Gorova.

K. IVANOV

„FERVOJISTO“ RAPORTAS

La 29-an de januaro j. k. en la Sindikata Domo de Transportlaboristoj en Stara Zagora okazis jarkunveno de la fervojista E-societo „Fervojisto“. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA Petko Bonev kaj la sekretario de la urba societo Nejko Kunev.

Raporto pri la agado de la fervojistoj-esperantistoj faris la societa sekretario Tončo Jeleŭ. Li detale priskribis la atingojn de la societo dum 1986, substrekis la viglan partoprenon de societaj membroj en amikaj renkontiĝoj kun aliaj E-societoj en Razgrad, Vraca, Blagoevgrad, Silistra k. a., dum kiuj oni interŝanĝis sperton.

Kreskis la nombro de la societaj membroj de 30 al 40 personoj, ĉiuj estas abonantoj de „Bulgara Esperantisto“. Estas ankaŭ kelkaj abonantoj de „Paco“, „Scienco Mondo“, „Fervojisto“ k. a.

G. NASTEV

DISTRIKTA PLENKUNSIDO

GABROVO. La 2-an de marto 1987 okazis plenkunsido de DE de BEA. Gastis Lili Petkova — reprezentantino defako „Agitado kaj propagando“ de DK de BKP.

Pri la stato de la E-movado en distrikto Gabrovo parolis Neno Janev — prezidanto de DE de BEA. Oni tiris ŝanĝojn en la konsisto de la Buroo. La nova prezidanto estas ing. Ivan Petrov kaj sekretario-kasisto Julieta Meteva.

Sonja TIROVA

JARKUNVENO DE INSTRUISTOJ

En la Domo de Instruistoj — Ruse, en februaro j. k., okazis jarkunveno de esperantistoj-instruistoj. La salono de la domo plenumis ĝeinstruistoj-esperantistoj kaj ĝelernantoj el la lerneja Esperanto-klubo de lernejoj „Vasil Kolarov“, „Olimpi Panov“ k. a.

En sia raporto la Estraro de la instruista societo „Kulturoj“ emfazis varian agadon: fondo de novaj instruistaj kaj lernejanaj kluboj ĉe apartaj lernejoj, enlandaj kaj eksterlandaj ekskursoj, partopreno de du instruistinoj — Nadeŝda Ganĉeva kaj Ana Petrova, en la 71-a Universala Kongreso en Pekino pasintjare. Antaŭ amasa publiko en la urbo kaj en la distrikto s-ino Ganĉeva raportis pri siaj vojaĝimpresoj pri Ĉinio, proekciante kolorajn lumbildojn.

Jordan KALINOV

VIGLA AGADO

82-jaran agadon havas post si la urba E-societo „Vekiĝo“ en Sumen. Dum pluraj jaroj ĝiaj membroj obstine laboris por plialtigo de la kultura nivelo de siaj samurbanoj, por progreso de Esperanto kaj por stabiligo de la monda paco. Pro ĝiaj meritoj jam en 1965 la societo estis honorita por la ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Ĝi estas distingita ankaŭ per la Honora Signo de urbo Sumen, per 2 oraj medaloj de la Nacia Pacdefenda Komitato kaj per la Honora Insigno de MEM.

Nun en „Vekiĝo“ membras ĉirkaŭ 70 personoj. Ĝi helpis la fondon de tri novaj societoj: ĉe la Kombinito por Sargautomobiloj, ĉe la Kombinumo por Pri-laborado de Aluminio kaj ĉe la distrikta malsanulejo. Bonaj estas la rezultoj de la societanoj: riĉenhava kolektiva kaj individua korespondado, reciprokaj vizitoj, viglaj rilatoj kun esperantistoj el la ĝemelurboj Magdeburg (GDR), Debrecen (Hungario), Hersen (USSR), parte kun Usti nad Labem (CSSR). Pere de Esperanto la ŝumenaj esperantistoj ricevas materialojn pri la scienc-teknika progreso, pri protektado de la naturo, defendo de la paco k. a. La plej bonaj el ili trovas lokon en ĵurnalo „Sumenska Zarja“, aŭ en la emisioj de Radio Sumen. Dum la lastaj du jaroj niaj membroj partoprenis universalajn kaj IFEF-kongresojn, gastis ĉe siaj ĝeamikoj eksterlande, me gastigis ĝesamideojn el Francio, GDR, CSSR, Hungario, Svislando. Dum la Jaro de l'Paco (1986) ili kolektis centojn da subskriboj sub la Apelo de Hiroŝimo kaj Nagasako. Ĝelernantoj el IV mezlernejo „N. Vapcarov“ en Sumen, sub la gvidado de la instruistino Neli Dimitrova, sukcese sin prezentis dum la Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto en Razgrad.

Tiu bona agado de la societo estis raportita dum la jarkunveno (meze de februaro j. k.). Oni decidis per Malfermita Letero, konigi al la monda esperantistaro la vivon kaj agadon de la eminenta bulgara patrioto-revoluciulo Vasil Levski, kies 150-an naskiĝtagon celebras ĉi-jare nia popolo.

Cvjetko TODOROV

UZINA SOCIETO

La 20-an de februaro 1987 ĉe la Uzino por rezervaj elementoj en urbo Gorna Orĵahovica estis fondita la unua en la distrikto de Veliko Tŕrnovo uzina E-societo, nomita „100 jarojn Esperanto“.

La membroj de la nova societo estas laboristoj, ing-nieroj kaj oficistoj, kiuj arde deziras ellerni Esperanton. Ĉiuj estas abonantoj de „Bulgara Esperantisto“, serioze okupiĝis pri Esperanto en kurso gvidata de Dimitŕ Petkov — prezidanto de la societo, kaj dezi-

ras korespondi kun bulgaraj kaj eksterlandaj gesamideanoj.

Nia adreso estas: 5100 urbo Gorna Orjaĥovica, Zavedo za rezervni ĉasti, E-societo „100 jarojn Esperanto“.

Angel DIMITROV,
prezidanto de la uzina
sindikata komitato

FERVORA AKTIVADO



Junaj esperantistoj el Orjaĥovo kune kun N. Bosaŝka.

La 15-an de decembro 1986 en Orjaĥovo okazis la jarkunveno de nia E-societo „G. Stanev“. Samtempe ni celebris ĝian 10-an datrevenon kaj la 127-jaran datrevenon de la naskiĝo de L. L. Zamenhof. Krom la organizaj demandoj estis ankaŭ arta programo en kiu sin prezentis per E-recitaloj kaj E-kantoj la infanoj Rumjana Bogdanova kaj Emilija Mihailova akompanante de M. Velĉev — instruisto pri muziko. La kunvenon ĉeestis kiel reprezentanto de DE de BEA en vraca Bojĉo Mladenov elstara E-instruanto. Esperantistoj el Lom salutis la kunvenon per telegramo. Estis elektita nova societa estraro.

La agado de niaj esperantistoj estas interesa, N. Bosaŝka gvidas E-kurson por infanoj, estis prezentita prelego pri Zamenhof per la loka radiostacio. Ni ankaŭ faris, laŭ komuna unuanima interkonsento, poŝtpakon kun novjaraj donacoj kaj sendis ĝin al la suferintaj pro terura tertremo en Strajica.

N. BOSAŬKA

Tra la gazetaro

EN SOFIO:

J. „Rabotniĉesko delo“ (5. II. 1987) aperigis sur du kolumnoj intervjuon kun Hristo Gorov, prezidanto de BEA, okaze de antaŭstaranta centjara jubileo de Esperanto. La intervjuon faris Maria Jankova-Bojaĝieva; La sama ĵurnalo (7. II. 1987) aperigis detalan informon kun bildo pri la jubilea Esperanta poŝtmarko, eldonita en nia lando; Sub titolo „La komencon faris d-ro Esperanto“ J. „Oteĉestven Front“ (2. III. 1987) aperigis informon kaj bildon sur du kolumnoj de Atanas Ilkov, speciala sendito de la redakcio al Varsovio por informi pri la preparaj laboroj por la jubileo de Esperanto; J. „Veĉerni Novini“ (28. II. 1987), en rubriko „100 jarojn Esperanto“ informas per la plumo de Zdravka Dimitrova pri amikaj ligoj de Esperanto-klaso el 118-a lernejo en Sofio kun japanaj infanoj-es-

perantistoj J. „Sofijska Pravda“ (23. I. 1987) aperigis artikolon pri Trifon Hristovski, esperantista publicisto, kaj reprenis lian artikolon „Esperanto kaj la proletaro“, aperinta en 1931 en la bulgarlingva gazeto „Mejdunaroden Ezik“; La uzina gazeto „Kremikovski Metalurg“ (20. II. 1987) sur tuta paĝo donis lokon al intervjuo kun Hristo Gorov, prezidanto de BEA, kaj al tri fotoj de eksponaĵoj el Bulgara Esperanto-Muzeo. La intervjuon prenis Petja Miteva.

EN LA LANDO:

J. „Ŝumenska Zarja“ — u. Sumen (5. I. 1987) informis pri gastado en la urbo de la svisa esperantisto E-Künsli; En la sama (8. I. 1987) — informo de Cvjatko Todorov pri la agado de uzina E-societo „Metalurgo“; En la sama (24. II. 1987) — informo pri la urba E-societo „Vekiĝo“; La sama (25. II. 1987) aperigis artikolon „Semajno de la amikeco de Cvjatko Todorov“; J. „Oteĉestven Zov“ — u. Vraca (16. I. 1987) „Georgi Dimitrov kaj Esperanto“ de Bojĉo Mladenov; La sama (24. II. 1987) aperigis artikolon pri la Semajno de Amikeco same de Bojĉo Mladenov; J. „Haskovska Tribuna“ — u. Haskovo, (10. II. 1987) publikigis artikolon pri L. L. Zamenhof de Nikola Uzunov; La urba gazeto „Botevgradski Planak“ — u. Botevgrad (10. I. 1987) aperigis artikolon pri Trifon Hristovski kaj tradukon de lia artikolo „La agrara krizo kaj la batalo de la bulgaraj kamparanoj“, aperinta en 1934 en gazeto „Sur Posteno“; La urba gazeto „Drjanovska Iskra“ — u. Drjanovo (10. I. 1987) publikigis dukolumnan artikolon „Lingvo de la paco“ de Geno Manev, kiu temas pri la movado en la lando kaj tra la mondo; La uzina gazeto „Duma na Metalurga“ — u. Sumen (19. I. 1987) informas pri la agado de la uzina E-societo „Metalurgo“ en la Kombinumo por Aluminio.

Kie • Kiam • Kion

INTERNACIA JUBILEA SEMAJNO

Hungara Esperanto-Junularo invitas gejunulojn al ripoztendaro en Hungario, kiu okazas la 10—16-an de julio 1987 en la urbo Szeged.

La programo antaŭvidas amuzajn kaj seriozajn programojn: seminarioj pri naturmedioprotektado, komputado, movada progreso ktp. samnokta banado, fiŝkaptado, konkurso, ekskursoj, bivakfajroj ktp.

La komitato de TEJO fakte jam du jarojn ne kunidis, tial organizante tiun ĉi NEFORMALAN ANTAŬKONGRESON DE IJK HEJ aparte invitas ĉiujn komitatanojn inkluzive ankaŭ la Estraron de TEJO por ebligi personajn traktadojn kaj preparadon de la „vera“ komitatkunsido. Ĉe la fino de la semajno — 17-an de julio, oni komune veturos al Pollando.

Dum la semajno oni loĝos en aparta tendaro en 2—6-litaj ĉambroj apud rivero Tisza. Eblas ankaŭ tendumi per propra tendi. La partoprenkotizo inkluzivas loĝadon, manĝadon kaj programojn. Gejunuloj el socialismaj landoj povas pagi surloke en forintoj laŭ la kategorio de la aliĝo; tiuj el okcidentaj landoj pagu al UEA, laŭ la konto de HEA.

La partoprenkotizoj:

Kategorio I. (loĝado en 2—4 litaj ĉambroj)	2040 Ft./120 gld.
— aliĝo post 1-a de junio;	2400 Ft./140 gld.
Kategorio II. (loĝado en 4—6 litaj ĉambroj)	1500 Ft./90 gld.
— aliĝo post 1-a de junio;	1860 Ft./110 gld.
Kategorio III. (loĝado en propraj tendoj)	1000 Ft./60 gld.

Aliĝadreso: Hungara Esperanto-Junularo,
Szilvási László
H-1368 Budapest pk. 193,
HUNGARIO

LABORISTA INTERNACIA AMIKECO

Jam kelkajn jarojn sukcese agadas laborista E-societo „Metalurgo“ ĉe la kulturdomo de Metalurgia Entrepeno por Prilaborado de Aluminio „Prof. St. Stamenov“ en Sumen. Ĝia prezidanto estas ing. Nikolaj Kalev — scienca kunlaboranto en la Instituto pri kolormetaloj — Plovdiv. La societon fondis kelkaj entuziasmaj adeptoj de Esperanto, sed nun ĝiaj membroj — ĝenerale junaj kaj sciamaj homoj el la diversaj entreprenaj sekcioj kaj fakoj, jam nombras kelkajn dekojn. Multaj el ili kiel Todorka Georgieva, Tanja Angelova, Ilija Andreev sukcese korespondas kun eksterlandaj geamikoj. En 1986 grupo da novaj geesperantistoj pasigis neforgeseblajn tagojn en E-tendaro (u. Potsdam, GDR). Multaj partoprenis diversajn E-renkontigojn, konferencojn kaj aliajn aranĝojn en nia lando. Ĉiumerkrede grupo da komencantoj — membroj de la societo, diligente lernas la lingvon. En la entreprena ĵurnalo oni ofte publikigas informojn pri la agado de la esperantistoj kaj tradukojn el la ĵurnalo de la samfaka uzino en u. Sekeŝfehervar (Hungario), ricevataj per Esperanto-korespondado.

Dum la jarkunveno, okazinta decembre de 1986, en la tago de la 127-a naskiĝtago de d-ro Zamenhof, estis raportita la unujara sukcesa agado. Raporton tralegis Ilija Andreev — multjara sindikata kaj esperantista aktivulo kaj kursgvidanto. Li direktis sincerajn dankvortojn al la partia, sindikata kaj administra estraroj pro la subteno kaj helpo al la E-movado en la entrepreno. La plej aktivaj esperantistoj dum la jaro: Asen Ivanov, Georgi Vasilev kaj ing. Darina Kirilova ricevis donace Esperanto-librojn. La kunveno akceptis decidojn pri inda celebado de la 100-jara jubileo de Esperanto. La ĉeestantoj kun granda intereso trarigardis ekspozicion el belaj lignogravuraĵoj — verkoj de la esperantisto-laboristo Pal Szerenyin (el la uzino en Sekeŝfehervar). Tiu ekspozicio estas plia esprimo de la amikeco inter ambaŭ laboristaj kolektivoj, akirita helpe de Esperanto.

Cvjatko TODOROV

Joëlle Rabu en Eŭropo



Joëlle Rabu, profesia kantistino kaj aktorino, kiun la kongresanoj en Pekino jam povis admiri, ĉi-somere koncertos en Eŭropo. Ĉu ankaŭ en via urbo aŭ regiono?

La grupo konsistas el Joëlle Rabu kaj tri muzikistoj: Tom Neville, Charlie Knowles kaj Douglas Dodd.

La periodon de junio ĝis septembro 1987 ŝi rezervis por Esperanto-koncertoj, ŝi kaj la grupo pretas fari „jubileajn koncertojn“ survoje al la UK en Varsovio aŭ revene de ĝi. La duhora programo povos esti tute en Esperanto aŭ povas esti multlingva.

La neforgesebla Veselin Damjanov, kiu vere amis la voĉon de Joëlle, diris al Wally du Temple: „Kvankam ŝia voĉo kaj la kantoj tute malsimilas al la miaj, ŝi certe estos pli populara ol mi por la ĝenerala publiko, ŝiaj kantoj estas leĝeraj kaj ŝia voĉo belsone potenca“. Ekzistis plano, ke Veselin kaj Joëlle renkontiĝu en Eŭropo survoje al la jubileo por Esperanto-koncerto de du belegaj voĉoj, du malsimilaj genroj kaj stiloj. Mi ege bedaŭras, ke la sorto decidis ion alian. Dum sia turneo en Kanado Veselin diris: „Mi kantu multlingve kaj la programo inkluzivu trionon de Esperantaj kanzonoj: per belarto mi sentrude, montru la belecon de Esperanto.“

Mi konsentas kun li kaj invitas vin realigi por vi, por Veselin, por Joëlle kaj mi, la devizon: „per belarto al popolamasa kompreno de la riĉeco kaj taŭgeco de Esperanto“.

Se tio plaĉas al vi, se plaĉas al vi labori kun ĉarma 26-jara kantistino, pri kiu aperis artikoloj en la Esperanto-gazetaro — ne hezitu kaj skribu al: Wally du Temple, por „La Rabu Jubilea Turneo“, 765 Braemar Ab., Sidney, B.C. V8L 3S1, Kanado.

HELPO PETATA

Samarkanda Klubo de Interpopola Amikeco „Esperanto“ organizas internacian ekspozicion pri la agado por sana vivmaniero, kontraŭ alkoholo kaj fumado. Tiucele ni kolektas ĉiulingvajn tiutemajn afiŝojn, fotojn, desegnaĵojn, insignojn, gluetikedojn, poŝtkartojn, revuojn, librojn kaj ĉiujn ceterajn propagandilojn pri sana vivmaniero. Ni korespondas tiuteme en Esperanto, angla, rusa, uzbeka kaj laŭbezzone ankaŭ

en aliaj lingvoj. Bonvolu sendi ĉion (plej eble baldaŭ) al:
International Friendship Club „Esperanto“
P. O. Box 76
703 000 Samarkand
Uzbekistan USSR

Al ĉiu helponto ni volonte sendos laŭdezirajn memoraĵojn.

Daŭre validas. Represo kaj nacilingvaj anoncraĵoj dezirataj.



BULGARIO

ANELIA MINCEVA (16-jara) — 1156 Sofio, str. „31-a de januaro“ 3 — kun geamikoj el ĉl.

SPAS PETROV (36-jara fraŭlo) — 2303 Pernik, str. „Mladen Stojanov“, bl. 2 TEC, v.h. B, kv. Moŝino — kun geamikoj el ĉl.

IVELINA STEFANOVA — Burgas, k/s „Slavejkov bl. 37, v.h. 4, et. 2, ap. 5 — pri ĉt, kun ĉl.

D-ino LOZANA GEORGIEVA (fraŭlino, denktkuracisto) — 3500 Berkovica, k-s „Lenin“ bl. 10, v.h. B., ap. 31 — kun gesamideanoj-kuracistoj el Eŭropo, Aŭstralio kaj Japanio pri medicino kaj kuracado. Kolektas PM kaj kalendaretojn

MITKA KCCEVA (47-jara oficistino) — 4523 Banja, distrikto Pazargik — kun ĉl. pri ĉt. Kolektas BK, insignojn, E-revuojn, anekdotojn kaj mallongajn rakontojn.

15. MEDICINISTOJ deziras korespondi kun gekolegoj el diversaj landoj. Komuna adreso — Jordanka Bačvarova, „Dimităr Ivanov“ 15 5000 Veliko Tŕrnovo.

ĈEHOSLOVAKIO

ZDENA MOCOŬÁ (29-jara instruistino) — Gottwaldova 621, 472 01 Dorsy — kun amikoj pri literaturo, muziko, turismo, florkultivado.

IVAN BORGOS (16-jara) — SES-Mládečnicka 158, 026 01 Sereď, pri populara muziko kaj geografio.

POLLANDO

JAROSLAW ZABLOCKI — ul. A. Zawadzkiego 51/2, 65-528 Zielona Góra.

ALEKSANDRA BILY (37-jara oficistino) — ul. 18 Stuczina 10/3, PL-30-045 Krakow — pri literaturo, kuirarto, BK, alumeetikoj kaj turismaj prosperoj.

WIESLAWA SIWECKA (35-jara fraŭlino, librotenisisto) — ul. Paderewskiego 15a/4, 41-710 Ruda Slaska 10 — pri folkloro, literaturo, kaj turismo.

GELERNANTOJ-komencantoj (13—15 jaraj) dez. kor. kaj interŝ. PM, BK, E-ajojn. Komuna adreso — Esperanto-Rondeto, Patac Mlod Ziezy, ul. Żeromskiego 26, PL — 81-346 Gdynia.

ATENTON!

Karaj legantoj!

Bonvolu korekti du erarojn allasitajn en n-ro 4/1987 de „Bulgara Esperantisto“

1. En la artikolo „Aktuale pri Zamenhof“ de Nikola Aleksiev, sur p. 11, dekstra kolono, linio 24-a de malsupre, anstataŭ la vorto malkovriginta bonvolu legi malnoviginta.

2. Sur paĝo 7, sub la titolo „Favorato de la publiko (en la dekstra kolono), anstataŭ (Anani Anev — 80—jara), bonvolu legi Anani Anev — 70—jara

Ni pardonpetas nian karan jubileulon, esperante, ke ni kune festos ankaŭ lian veran 80-jarigon.

La redakcio

ENHAVO

II Soldato reveninta el la fronto (Pavel Stirov)

1 Renkonte al gloraj jubileoj

2 Pri la mondlingva problemo (prof. d-ro Paavo Ravila)

3 Eldonado de E-lerniloj (Nedka Valjavičarska)

4 Niaj veteranoj: Georgi Dolapčiev (Stefka Ĉenkova)

5 Neforgesebla amiko de Esperanto (Nikola Aleksiev)

6 In memoriam: Forpasis Simeon Hsapčiev (Kunčo Válev)

7 Juna Esperantisto: Nova jugoslava E-generacio (Branko Gurič)

8 Lingvaj demandoj:

Pri la propra nomo de Zamenhofa planlingvo (Ganko Murgin); Korekta uzo de „kva-zaŭ“ (Evgeni Georgiev)

8 Raporto el Eŭropa Esperantujo (Yoshiaki Mizuno)

11 Leteroj de korespondamikoj: Mia japana amikino (Pavlinka Makaveeva)


12 Dimčo Debeljando — poeto de la hela kredo (K. Válev)

13 Esperanto en profesioj: Laborista internacia amikeco (Cyjatko Todorov)

IV Genia rusa poeto (Lidia Raeva)

Sur la unua kovrilpaĝo: Letero de malproksima Esperanto-amiko.

Foto: Kirilka SAVOVA



Respondo al la „Magia triangulo“ en n-ro 4/1987.

Ĉefredaktoro: Dončo HITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Mariana ELENOVA, Dimităr HAĜIEV, Krástju KARUCIN, Georgi MIHALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Teknika aranĝo: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Hristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66

1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

Genia rusa poeto



Antaŭ 150 jaroj ĉesis bati la koro de la granda rusa poeto Aleksandr Sergejeviĉ Puŝkin (1799—1837). „L suno de nia poezio subiris!... — skribis tiam la amikoj de la poeto, esprimante la tutpopolan doloron pro la grandega perdo.

Puŝkin fariĝis viktimo de la sufoka atmosfero de la aŭtokrata cara reĝimo. „Teruran, nigran sorton havas ĉe ni ĉiu, — skribis Hercen, — kiu kuraĝas levi la kapon super la nivelo desegnita de la imperiestra sceptro. Ĉu poeto, ĉu civitano aŭ pensulo — ĉiujn ilin la senindulga sorto puŝas en la tombon...“

Sed vivas kaj eterne vivos la Puŝkin-testamento — lia verkaro, en kiu ni trovas nekompareble belsonajn, muzikplenajn, libere fluantajn versojn, bonegan realisman prozon, fortajn dramverkojn, kuraĝan publicistikon... Profunda, hela kaj pura, senfine vasta kaj varia estas la kreomondo de Puŝkin. Kaj samtempe — saturita de amo al la homo, de kunsento al ties malfeliĉoj kaj gojoj.

La epoko de Puŝkin estis eksterordinare maltrankvila. Tio estis la epoko de la Granda Franca Revolucio, de la Patrolanda Milito 1812, de la Dekabrista Ribelo (1825). Kiel civitano Puŝkin ĉiam staris en la centro mem de la tiama rusa realaĵo, vivis per la bataloj kaj streboj de sia popolo. Li ne estis membro de la sekreta organizaĵo de la dekabristoj¹, sed li ĉiam estis defendanto de la homa libero kaj malamiko de ĉiu malvero, de ĉiu maljustaĵo. La sorto de liaj amikoj-dekabristoj kiel peza ŝtono kuŝiĝis sur lian koron. En Siberion li sendis al ili versojn plenajn de kordoloro kaj mildeco, kaj en tiu sia epistolo li profetas la triumfon de iliaj ideoj en la estonto.

Unu el la plej grandaj meritoj de Puŝkin al la rusa literaturo, „lia historia heroaĵo“ (laŭ la vortoj de I. S. Turgenev) estas la starigo de la rusa literatura lingvo. En la studado de la historio, de la populara lingvo, poezio kaj vivmaniero li vidis tiun lernejon, tra kiu devas pasi la literaturo, por estiĝi esprimo de la rusa nacia spirito. Li kreis literaturon novan, prikantantan la „simplan majestecon de la ordinaraj homoj“. Inter liaj plej belaj verkoj menciindas la poemoj „Ruslan kaj Ljudmila“, „Bahĉiserajla fontano“, „Ciganoj“, la fama vers romano „Eŭgeno Onegi“, la dramo „Boris Godunov“, la noveloj „La kapitanfilino“, „Dubrovskij“ k. a.

Jam antaŭ la liberigo de Bulgario elsub osmana jugo reprezentantoj de la tiutempe malmultnombra bulgara intelektularo konis kaj admiris la grandan rusan poeton. La unuajn tradukojn de liaj verkoj en la bulgaran faris en 1852 la poeto kaj kleriganto Petko R. Slavejkov. Ĉirkaŭ 1887 li publikigis la tradukojn de plia deko da Puŝkin-versaĵoj. Estis eldonitaj ankaŭ „Fabelo pri la fiŝisto kaj la fiŝo“, la dramo „Nimfo“, la noveloj „La kapitanfilino“ kaj „Trefa damo“ — fakte nur eroj el la heredaĵo de la „genia pensulo de la regionoj kaj landoj slavaj“, kiel karakterizis Puŝkin la klasikulo de la bulgara literaturo Ivan Vazov. Pli malfrue aperis ankaŭ la tri Puŝkin-poemoj „Poltavo“, „Bahĉiserajla fontano“ kaj „Ciganoj“ — en traduko de la bulgara verkisto Aleko Konstantinov, la aŭtoro de „Baj

Ganju“ — romano direktika kontraŭ la aŭvideco kaj la sociaj malbonoj en tiama Bulgario.

Do jam antaŭ 100 jaroj, kiel ni povis konvinkiĝi, Puŝkin estis „komuna“ por rusoj kaj bulgaroj, ĉar li vekis „bonajn sentojn“, gloris la liberon, senmaskigis la kortegajn „lakeojn“. Sed, bedaŭrinde, tiuj samaj „lakeoj“ kruele venĝis al la eminenta bulgara esploristo kaj tradukisto de Puŝkin—50 jarojn post la pereco de Puŝkin, Aleko Konstantinov estis embuske pafmortigita. Tiutempe li estis nur 34-jara — li eĉ ne atingis la Puŝkin-aĝon...

Nun en Bulgario la verkaro de Puŝkin estas vaste konata, la eldonkvanto de liaj verkoj superis 1 100 000 ekzemplerojn.

Puŝkin vivis en periodo de historia turnopunkto kaj el la profundo de sia „kruela jarcento“ etendis manon al la estontaj generacioj. Li verkis por la estontaj jarcentoj kaj popoloj, tial ni sentas lin nia nuntempulo — li helpis, helpas kaj helpos la evoluon de la spiritaj ligoj inter niaj frataj popoloj.

Lidia RAEVA

¹Dekabristoj — partoprenantoj en la Decembra ribelo 1825. Kelkaj el ili estis mortkondamnitaj. La ceteraj — ekzilitaj en Siberion.

A. S. PUŜKIN

ANCARO

En la dezert' sterile nuda,
El grund' bakita de sun-ardo
Ancar' ekĝermis, staras muta.
Ne kreskis en proksim' eĉ kardo.

Ĝin naskis la soifa tero
En furiozo mondmalbena,
Kaj per veneno de kolero
Saturis ĉiun fibron plena.

Venen' filtrigas tra la krusto
En la tagmeza varmo suna,
Ĉe l' vento de vesperkrepusko
Koaglas je rezino bruna.

Proksimon ĝian bird' evitas
Kaj timas tigro. Se la sibla
Venteg' la branĉojn ekagitas,
Tuj plu ĝi flugas, venenkribra.

Kaj se la nuboj de l' ĉielo
Pluverojn sur ancaron ŝutas,
De la folioj kaj de l' ŝelo
Veneno tiu teren gutas.

Hom' homon tamen por aliro
Komandis per rigard' rigora.
Fidele iris tiu viro,
Revenis kun la suk' horora.

Portante krom rezin' fatala
Velkintan branĉon en tornistro,
Kun ŝvit' malvarma sur la pala
Vizaĝ' sin trenis la servisto.

Li falis tie tuj en sveno,
Pro elĉerpiĝ' de l' lasta forto.
Ĉe l' trono de la suvereno
La sklavon tiel trafis morto.

La princo ĉiujn sagojn suki
Ordonis per venen' ancara,
Per arkoj tiel sendis flugi
La morton al popol' najbara.

Esperanta traduko de K. KALOCSAY